

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protaktantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Noria, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 144**  
**8. 7. 1923**

Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
Zanoni (literaturo)  
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)  
Esperanto Triumfonta  
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

### Unua Sudslava Esperanta Kongreso.

(Zagreb, 29.—31. julio 1923.)

La 29-an de julio malfermiĝos en urbo Zagreb la Unua Esperanta Kongreso de samideanoj loĝantaj en la regno de serboj, kroatoj kaj slovenoj.

Jam multaj landoj povas indiki sian kongresojn per ducifera nombro, kaj tial inter ili la sudslava aperos kiel la plej nova.

Sed ĝia titolo Unua tute ne signifas, ke nia movado ĵus ekfloris en la sudslava regno; kontraŭe, ĝi estis tie tre signifa kaj pozitiva jam multajn jarojn antaŭ la mondmilito, kiam la sudslavaj landoj ankoraŭ ne estis unuigitaj en unu regno. La iam aperintaj gazetoj „Kroata Esperantisto“ kaj „Serba Esperantisto“ enhavis larĝan kronikon de niaj sukcesoj, kaj la verkoj de sudslavaj aŭtoroj estas prezentitaj en nia literaturo per pluraj konataj tradukoj.

La kongreso estas unua pro la noveco de la regno mem, pro la foresto de antaŭa organizo kaj ĉefe pro tio, ke sudslavaj samideanoj honeste kaj fidele decidis havi en sia unua kongreso nebran sukceson, kiu ne venas sen bonaj kaj prilaboritaj preparoj.

Kiel loko por efektiviĝi la kongreso estas elektita la ĉefurbo de Kroatoj Zagreb tial, ke samideanoj en tiu ĉi urbo sukcesis pli grandamplekse kaj efike starigi sian societon, konduki la plej viglan propagandon, malfermi multajn kursojn, aranĝi publikajn propagandajn paroladojn, eldoni gazeton kaj librojn, prezenti teatraĵojn en Esperanto kaj muzikajn koncertojn, do ĝenerale tial, ke zagrebaj samideanoj en sia urbo havas bonan fundamenton, sur kiu la movado de la tuta regno ankoraŭ povus esti fortike bazita.

Zagreb, la ĉefurbo de Kroatoj kaj Slavonio, kuŝas je 120 metroj super la marnivelo, sur la rivero Sava, apud la deklivoj de monto Sljeme (1036 m. alta) kaj havas ĉirkaŭ 130 000 loĝantojn. La loko, kie nun estas Zagreb, estas historie konata de la VII-a jarcento, sed ĝia preciza historia kroniko komenciĝas de la jaro 1093, kiam reĝo Ladislav, bofrato de reĝo Dimitrio Zvonimir, faris ĝin sidejo de episkopo.

En 1110 Zagreb fariĝis fortikaĵo kaj rezidejo de reĝo Andreo. Post la jaro 1198 ĝis la XVI-a jarcento la urbo travivis vicon de multaj civilaj militoj.

Sub la regado de aŭstro-hungaroj Zagreb estis granda provinca urbo kaj disvolviĝis kiel centro oficista kaj de ekleziaj aŭtoritatoj.

Nur post la mondmilito en la nova situacio de grava landa centro Zagreb ŝanĝis sian patriarkan vivon kaj komencis disvolviĝi je centro komerc-industria, kio preskaŭ duobligis ĝian loĝantaron kaj kreskigis la urban teritorion. Tiu ĉi kresko mirigas ĉiujn. Kun amerika febro novaj modernaj partoj de la urbo aperas tie, kie estis antaŭe kampoj kaj foirejoj.

La urbo konsistas el du malnovaj partoj: „supra urbo“ kaj „Kaptol“ kaj unu nova aŭ „malsupra urbo“. Ni menciujn ankaŭ la plej novan modernan parton de la „Malsupra urbo“ konstruata sur la foirejo „Sajmište“, kiu post unu—du

jaroj fariĝos efektiva komerc-industria centro de Zagreb.


Zagreb estas ĝardeno urbo. Centran lokon kaj ĉefan promenejon de Zagreb prezentas bela urba ĝardeno Zrinjevac ombrita de larĝaj plantoj.

La alia granda urba parko estas Tuŝkanac, kiu etendiĝas de la urba centro je kelkaj kilometroj al la periferio. Je kelkaj centoj da paŝoj

sia signifo kaj allogaĵoj estos sufiĉe interesa, oni esperas, ke ĝin vizitos ankaŭ multaj alilandaj samideanoj. Zagreb estas tre gastema urbo kaj bone ligita kun la najbaraj landoj. Post la fermo de l' kongreso oni aranĝos komunan karavanon de diverslandaj samideanoj al Nürnberg. Por informoj oni sin turnu al la porkongresa komitato pere de Sudslava Esperanto-Servo, Zagreb, Jezuitska ul. 1.

Prezidanto:  
Dr. Marruzi.

Sekretario:  
J. Rotkvič.



Zagreb.

Panoramo vidata de la ĉefa stacidomo.



Zagreb.

Nacia Teatro.

estas placo de Wilson kun belega reĝlanda Opero kaj Drama Teatro.

El aliaj vidindaĵoj de l' urbo ni menciuj la Katedralon, Jugoslavan Akademion, Universitatan Bibliotekon, Pentroarian Galerion kun pentraĵoj de famaj artistoj de multaj skoloj, Placon de Banuso Jelačić kun ties monumento; en „Gornji grad“ historian placon de S-ta Marko kun malnova preĝejo kaj kroata landa parlamento, en kiu okazos la kongreso; muzeojn: zoologian kaj geologian, de artoj kaj metioj kaj etnografian.

En la proksimaj ĉirkaŭaĵoj estas notindaj: mond fama tombejo Mirogoj kun belaj arkoj kaj sarkofagoj, zagreba granda natura parko Maksimir kun larĝaj kaj amuzejoj kaj belaj vilaĝoj Šestine, Remete, Gračane, kie oni povas vidi pitoreskajn naciajn vilaĝajn vestojn. Oni faros al tiuj lokoj ekskursojn dum la kongreso. Speciale interesa estos la ekskurso al montopinto de Sljeme, de kiu ĉiuflanke malkovriĝas belega neforgesbla vido.

La programo de l' kongreso konsistas el partoj labora kaj amuza. En la unua parto oni ĉefe devas oficiale starigi Sudslavan Esperantan Ligon kaj akcepti ĝiajn oficialajn statutojn. Por la dua parto oni aranĝos kelkajn amuzovesperojn kun teatraĵo (Consilium facultatis), koncerto kaj kabaredo (Verda Rido). Ĉar la kongreso laŭ

garujo, kiu estigis hospitalon komunan, — escepte de Budapeŝto ĝi estis la unua, kiu ricevis elektran tramon kaj urban telefonon.

Timiŝoara kuŝas kalkulate de Ferro 38° 57' je orienta longeco kaj 45° 47' je norda larĝeco, 92 m super la maro, en la mezo de granda ebenaĵo, ambaŭborde de kanalo „Bega“. Frapante estas, ke Timiŝoara, kiu ne estas apud la rivero Timiŝ, sed apud rivero Bega, tamen ricevis la nomon de Timiŝ. La klarigo de tiu ĉi strangeco estas tiu, ke pli frue tiuj ĉi du riveroj mulloke kruciĝis unu la alian, tial ankaŭ en Timiŝoara. Kaj ke sekve de tio la tiamaj historiistoj uzis la nomon Temeŝvár.

### Monumento al D-ro Zamenhof.

La aperigo de la bildoj de la premiitaj verkoj por la Z. M. en nia gazeto kreis intereson kaj eksciton pri la projekto inter la samideanoj. Ni ricevis multajn leterojn priiraktantajn la meritojn de la verkoj, el kiu ni publikigas kelkajn hodiaŭ.

La Organiza Komitato informas nin, ke la tutmonda Esperantistaro povas esti frankvila, ke oni neniel intencas rapidigi la aferon. Oni bone rekonas, ke starigo de tia monumento estas koncerno de ĉiuj Esperantistoj, kaj tial oni esperas,

### Timiŝoara, la urbo de la III-a rumanlanda kongreso.

La III-a tutlanda kongreso okazos laŭ deziro de la II-a Okcidenta kongreso en Timiŝoara (Temeŝvár) la 27.—29. julio. Ĉi tiu deziro estas ja komprenebla, ĉar Timiŝoara estas el industria kaj komerca vidpunkto unu el la plej gravaj urboj de Rumanujo. Ĝi estas ĉefurbo de la plej kulturita regiono „Banato“, kiu estas sudokcidenta parto de la lando.

La historio de la urbo estas interesa, la fondigon oni ne konas. La nomon „Castrum Temesiense“ (Temeŝa fortikaĵo) oni trovis jam en malnova historio el jaro 1212, do Timiŝoara jam ekzistis, sed kiam ĝi estas fondita, oni ne scias. Laŭ aserto de kelkaj historiistoj 100—200 jarojn post Jesuo-Kristo sub regado de l' romanoj ekzistis urbo sur la loko de hodiaŭa Timiŝoara sub la nomo „Zambara“, kiu jam estis forikajo en la tempo de popolmigrado. Ĝi havis la nomon „Beguey“. La turkaj invadoj en la XIV-jarcento ruinigis la tutan Banaton, ili antaŭen iris jam en la jaro 1395 kaj en tiu jaro ili ankaŭ atingis Timiŝoara n.

Kvankam Timiŝoara kiel fortikaĵo estis la defendmuro de l' tuta okcidento, kaj kvankam pasis apenaŭ 180 jaroj, ke tiu ĉi urbo povis ricevi la okcidentan kulturon, ĝi estis ĉiam pioniro en la evoluo de urboj. Ĝi estis la unua, kiu enkondukis la elektran lumigadon por komunaj celoj, — la unua urbo tiutempe en Hungario, kiu estigis hospitalon komunan, — escepte de Budapeŝto ĝi estis la unua, kiu ricevis elektran tramon kaj urban telefonon.

Timiŝoara kuŝas kalkulate de Ferro 38° 57' je orienta longeco kaj 45° 47' je norda larĝeco, 92 m super la maro, en la mezo de granda ebenaĵo, ambaŭborde de kanalo „Bega“. Frapante estas, ke Timiŝoara, kiu ne estas apud la rivero Timiŝ, sed apud rivero Bega, tamen ricevis la nomon de Timiŝ. La klarigo de tiu ĉi strangeco estas tiu, ke pli frue tiuj ĉi du riveroj mulloke kruciĝis unu la alian, tial ankaŭ en Timiŝoara. Kaj ke sekve de tio la tiamaj historiistoj uzis la nomon Temeŝvár.



ke la fina decido estos nepre kontentiga al la plimulto, post zorgo konsiderado kaj interkonsiligo kun la samideanoj. La urĝa afero dumtempe fiam estas la pli vigla subteno de la monokolekto organizita per la sistemo de la kuponkartoj. La sekretariaj plendas, ke multaj fortoj centroj de Esperantujo ne klopodis eĉ postuli la kuponkartojn. Oni entreprenas ja nenian riskon en tio, aliflanke la sperto jam montris, ke tiuj samideanoj, kiuj havigis al si la k.-k., sukcesis vendi ilin por la bono de la kazo. Ni aparte petas la landojn, kies valuto estas en forta stato, ke ili klopodu pri la monokolekto kaj havigu al si la k.-k.

Skribu al la Honora Sekretario *J. D. Applebaum*, 11 Mayville Rd., Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.

**Kopioj de leteroj ricevitaj pri Zamenhof-Monumento.**

**Jules Thiébauld**, Carignan, Francujo, 21. aprilo 1923.

Mi havas la plezuron sendi al vi 20 frankojn, mian donacon al la Monumento. Mi preferas la I-an premiitan version.

**A. Ploussu**, def. de UEA Grenoble, 22. aprilo 1923.

Pri la du premiitaj verkoj por Monumento: La unua estas tre bellinia sed, laŭ mia opinio, la dua pli bone trafas alegorie kaj, en ne afekta stilo, donos pli da impresco al la homoj de tiu, kiun ni volas rememorigi. Do mia prefero kaj ankaŭ tiu de la ĉi tial samideanoj apartenas al la dua. (Li plue konsilas, ke la teksto estu redaktita en Esperanta lingvo kaj sendas 5 frankojn kiel donacon.)

**H. Bonnevie**, 21. marto, 1923.

Mi preferas la projekton „unua premio“. La alia certe estas pli impona sed la homaj figuroj ne ŝajnas al mi esti belaj.

**Aug. Pilnik**, Praha, 6. marto 1923.

Ekvidinte la du premiitajn verkojn, mi sincere diras, ke ili min ne kontentigas, esprimita — krom la surskribo kaj stelo neniu ideo, regantem la vivon kaj agadon de D-ro Zamenhof. Estis laŭ mia opinio granda eraro, ke oni limigis la konkurson sole je Polujo. Kia propagando por esperanta estus esinta la internacia pormonumenta konkurso! Ĝi certe estus alportinta al ni sole verkojn unuarangajn, sed ankaŭ atenton priesperanta de la ĉefaj artistoj tutmonde.

**R. Chapron**, Pont-de Gennes, Sarthe, 22. apr. 1923.

Mi preferas la unue premiitan projekton de la monumento.

**D. F. Romein**, Drumpt, Tiel, Nederlando.

La bildo de la dua projekto estas ne klare presita, speciale la figuroj, por tio mi ne povas akordigi kun la Org. Kom., kiu donas preferon al tiu verko. Mi tial preferas la unuan projekton. Kredible mi ŝanĝus mian opinion, se la dua premio estis pli bone presita, aŭ se mi persone povus vidi la du originalajn verkojn. Ĝenerale mi ŝatus monumenton simplan por nia majstro, kiu mem estis modelo de simpla kaj modesta homo.

**E. Urbach**, Antwerpen, 1. majo 1923.

La projekto, kiu akiris la unuan premion, estas la plej taŭga kaj merita esti akceptota de la Org. Kom.

**E. L. Osmond**, London, 29. majo 1923.

Konsentas kun tiu, kiu nek ŝatus la unuan nek la duan premiitan verkojn. Kiel oni ne povas havi altan piramidon sur kvadrata stela bazo, eble el verda ŝtono, tute simpla sed tafa pro ĝia neordinareco, do tian, kiel la aliaj ne vidas ĉie? D-ro Z. ne estis, ordinara homo, do lia monumento devas esti malordinara. Ni havu kolonon, kies pinto, kiel fingro, levigas ĉielon, kie loĝas la Dio de amo, kiu ni servis.

**Kroniko.**

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informo, ni bezonas sciliojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraci- aŭ privataj scilioj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Koncizaj, rapide, koncizaj, fidinde, legeblaj (precipe nomoj).

**Landoj.**

**Britujo.**

**Malapero de kolonelo Pollen.**

Ni legas en britaj gazetoj, ke la polico de Isle of Men (Insulo Man) serĉas solvon de l' mistera malapero de leŭtkol. John Pollen. Li loĝis sur la insulo, en Castletown kaj estis vidita lastfoje lundon, 25. junio, vespere, sur Arboret-streto en Castletown. Kolonelo Pollen estas granda amiko de Esperantujo; lia eventuala morto estus granda perdo por niaj movado en Britujo.

**Ĉeĥoslovakio.**

La ministerio de eksterlandaj aferoj plenumis la peton de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, ke estu donata 50% rabato je vizokostoj por kongresanoj el la ĵurnal-malbonvalutaj landoj, se ili vizitos Ĉeĥoslovakion ĉe la okazo de la kongreso de Nürnberg. Ĉiuj konsulejoj ĉeĥaj en la koncernaj landoj estas instruitaj de la ministerio doni rabaton, se iu prezentas la kongresan karton.

La ministerio de instruado petis ĈS. Asocion prezenti nomaron de la ĉeĥaj literaturaĵoj tradukitaj en Esperanto. La sendita nomaro enhavas 170 ĉeĥajn literaturaĵojn publikigitajn en diversaj Esp. gazetoj kaj 40 laborojn en manuskripto. Troviĝas inter ili tradukoj de kelkaj famaj romanoj ampleksaj, kaj teatraĵoj, kiel „Ruz“ de Ĉapek, prezentita antaŭ nelonge ankaŭ en Londono.

Esperanto kiel unu el la rimedoj por vekti la senton de la interhomna solidareco inter junularo estas rekomendata en la registara projekto pri reformo de la mezgradaj lernejoj.

La nombro de la membroj de la Honora komitato de CAE kreskis ĝis 70 eminentuloj.

**Hispanujo.**

**Esperanta vesperfersto en Baracaldo.**

La 17. junio, okazo de la fino de la unua kurso de Esperanto ĉe la Asocio de laŭm Lernantoj Salesianaj en Baracaldo ĝia komitato aranĝis vesperferston je honoro de nia Majstro. Ĉeestis multaj Esperantistoj de Bilbao kaj Baracaldo, kaj ankaŭ neesperantistoj.

Emiliano Muñoz, nova Esperantisto, salutis hispane la ĉeestantaron kaj precipe li tre dankis la ĉeeston de nia L. K.-ano, s-o Felikso Diez. Li kantis himnon al la verko de Zamenhof, kiun li komparis kun la fondinto de la Salesiana Kolegio, la respektinda Don Bosco. Fine li petis indulgon por la ŭndotoj de la teatraĵo prezentotaj en Esperanto, ĉar ili nur antaŭ tri monatoj ekstudis Esperanton. (Longa aplaŭdado.)

Tu! la lernanto s-o P. Marin deklamis tre bone la belan poezion de Zamenhof. „La Vojo“. Poste s-o Felikso Diez paroladis en Esperanto. Li faris la plej belan Esp. paroladon, kiun oni foje aŭdis en Baracaldo. Li parolis pri la Esperanta literaturo, komencante je la verkoj de nia Majstro, de Kabe kaj de aliaj, ĝis la laste aperintaj; precipe pri „Faŭsto“ kaj „Natan la Saĝulo“. Poste oni prezentis la komedion „La kontraŭaj karakteroj“ Esperantien tradukita de Baracaldano. La kurteno levigas kaj aperas la sceno, kaj jen unu post la alia aperas la aktoroj, kiuj antaŭ tri monatoj nenion sciis pri Esperanto, kaj ili ludis tre bone siajn rolojn. La aktoroj, s-oj Agustín, Sánchez, Mauricio Fernández kaj Antónino Sáiz, rikolitis specialan aplaŭdodon ĉe la fino de la prezento.

Duan paroladon faris s-o Sabino Hernández en hispana lingvo pri la temo „Esperanto kaj katolikismo“. Sinekve Leoncio Pedrosa faris monologon „La Fotografisto“ de nia talenta samideano, s-o Fr. Paula. Poste la Salesiana pastro, s-o Lorenzo del Pozo, deklamis perfekte je la belan Esp. poezion de Louise Brizge „Revelacio de Amo“. Antaŭ la fino oni ludis ankoraŭ komedion en hispana lingvo por la neesperantistoj. Ĝi estis tre bone prezentita de kelkaj iamaj lernantoj de la Asocio.

La lasta numero de la programo estis parolado de la prezidanto de la Esperantista Grupo de Baracaldo. Unue li parolis hispane. Poste en Esperanto li kuraĝigis la Esperantistojn por dadrigi la volon elektitan, ke ili turnu siajn okulojn alien, ekzemple komparante la vigan Esp. movadon en la nordaj landoj al tiu de Hispanujo. Ĝi tre bone impresis al ĉiuj ĉeestintoj.

**Hungarujo.**

**Pri Konferenco de Venezia.**

Győr: Propaganda parolado, antaŭanonco en ĵurnaloj poste ĉelarkitolo en unu ĵurnalo, kurso ĉe komerca ĉambro Debreczen. Oficiala longa raporto en ĵurnalo „Debrecezen Ujság“ de la ĉia komerca ĉambro.

Miskolc: La komerca ĉambro okupiĝis oficiale kun la raporto sendita de s-o Balkányi.

Pécs: Okazo de la landa kongreso anonciĝis pri parolado en ĵurnaloj, komerca fakunuiso sub prezido de komerca korporacio, raporto en ĵurnaloj, kurso.

Budapest: Pa-olado en la komerca ĉambro, raportoj en ĵurnaloj, kurso.



Timișoara. — Sinagogo.

**Italujo.**

Torino (Italio). La Esp. societo festis la fermon de la kursoj, kiuj donis bonajn rezultatojn, per promenado sur la monto de la „Maddaleno“ apud Torino. Nova Esp. renkonto estas de nun ĉe la Kafejo Luigi Jasio, Piazza Carlo Felice N. 12.

**Polujo.**

**Federacio de Esperantistaj Societoj en Polujo.**

**IV a Komuniko.**

1. La Estraro de la Federacio de Esperantistaj Societoj en Polujo komunikas, ke laŭ laste ricevitaj scioj de la Lodza Esperantista Societo, la dua tulpolua Esperanto-Kongreso en tiu ĉi jaro ne povas okazi. — Pri la dato kaj loko de la dua kongreso (plei certe en la jaro 1924) la Estraro de la Federacio nun por certaj kaŭzoj nenion ankoraŭ povas komenci; en konvena tempo ĝi sciigos pri tio per speciala cirkulero.

2. Konsekvence de tio la Federacio devas oficiale rezigni je sia eĉ arda deziro inviti la tiumondan Esperantistaron je la Universala Kongreso al Varsovio en 1924 a jero, pri kio koncerna komuniko al la Estraro de K. K. K. estas sendita.

3. Ĝis nun deklaris s'ian aliĝon al la Federacio la jenaj societoj: 1. Esp. Societo en Bielsk-Bielitz, 2. „Esperanto“ en Biala Podlaska, 3. Esp. Societo en Bydgoszcz, 4. „Pola Esperanto Servo“ en Bydgoszcz, 5. Esp. Societo en Deblin, 6. Societo „Esperanto“ en Lwów, 7. „Lodza Esperantista Societo“, 8. „Laboro“ en Łódź, 9. „Konkordo“ en Miedzyrzec, 10. „Konkordo“ en Varsovio, 11. „Laboro“ en Varsovio. — La Federacio esperas, ke la aliaj Esp. societoj en Polujo baldaŭ aliĝos (iliaj nomoj aperas en sekvantaj komunikoj) kaj tiamaniere plivivigos la Federacion, kiu per fortaj paŝoj marŝos antaŭen al la fina venko de Esperanto en Polujo.

**Rumanio.**

Alba-Julia. — Komenciĝis nova kurso gvidata de fervora fino Maria Steneci Partoprenis 15 personoj. Anina (Banato). — Kurso gvidata de s-o H. Wittenberger, farmaciisto, del. UEA. București. — 17. 6. la membroj de la Esp. grupo faris ekskurson al la danuba havenurbo Giurgiu ĉe la limo, kie atable gvidis s-oj oficioj Munteanu kaj Nedulescu, kaj la estraro de la ekspedicio „Hielos“ de Wien.

**Rusujo.**

Laŭ materialo de lidistoj mem la Bulteno de la Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (S. E. U.) komunikas jenajn sciojn pri ido-movado en Rusujo: 25-an de marto apartenis al rusa ido-ligo 75 membroj kaj 47 kandidatoj. 120 personoj en 58 lokoj interesiĝas por ido-movado. Rusa ido-centro depost sia ekzisto ricevis kaj forsendis en Rusujo 500 lerojn kaj pakajojn. Jus aperis ido-adresaro 1922, en kiu estas ncmittaj senescepte ĉiuj ido-organizaĵoj kaj apartaj lidistoj. Rusa fako de iud adresaro kalkulas 103 personojn en 29 lokoj; sed rapide nur irarigis dante ĝin, ĉi ni en ĝi povas trovi multajn neidistojn kaj Esperantistojn:

- en Astrahan: J. Kalinin — prezidanto de grupo de S. E. U., en Ekaterinoslav: R. G. Dink — redaktisto de japana Esp. ĵurnalo 1918—19,
- en Belorusio: D. Sneĵko — organizinto de Blankrusa Federacio Esp., en Moskvo: tri mortintoj: Profesofo Brandt (Esp. poeto), D-ro Titov (kiu fariĝis Esperantisto), D-ro Nesmejanov (aŭtoro de lingvo „Viva“),
- en Petrogrado: V. Ĉeŝihin — aŭtoro de lingvo „Nepo“,
- en Samara: Gaidovski — Esp. poeto (Peĉenego),
- en Vladivostok: D. Ziguri — delegito de S. E. U. H. Frank. (El „Bulteno de Centra-Komitato de S. E. U.“, n-o 4 [10], majo 1923.)

Rimarko de la Redakcio: Ankaŭ ni, kontrolinte la Adresaron, trovis multajn nekorektajn indikojn. La Esp. adresaroj estas kaj escepte restas pli fidindaj. R. Kr.

**Protektorato de S. E. U.**

14. majo S. E. U. fondi protektoraton kiu konsistas el politikaj, registaraj kaj sciencaj eminentuloj, kiuj simpatias al la celoj kaj taskoj de la Unuiĝo. Ĝi celas molar subteni la agadon por apliko de internacia lingvo inter la laboranta popolo de Rusujo kaj eksterlando, kaj por uzo de Esperanto kiel helpilo en batalo por la idealoj de nova socia ordo. Dum unua semajno jam anigis: F. Kon, ano de prezidanto de Centra Plenuma Komitato de la Ligo de Sovetaj Respublikoj; A. Buŝigin, rektoro de elektroteknika instituto de komunikiloj. Kiltler kaj Evgenev, profesoroj, protektoratoj de la sama inst.; M. Reinsner, profesoro, membro de socialista akademio kaj aliaj. H. Frank. (El „Bulteno de Centra Komitato de S. E. U.“, n-o 4 [10], majo 1923.)

**Sovetlando Esperanta Kongreso**

19.—22. julio en Moskvo okazos unua Kongreso de la Sovetlanda Esperantista Unuiĝo. Sur la tagordo staras jenaj punktoj:

- 1. Raporto de Centra Komitato de S. E. U. pri la laboro de la Komitato denost la Petrograda Kongreso 1921 ĝis julio 1923 (Rumenoviĉ). 2. Raporto de la lokoj. 3. Organiza demando (Drezen). 4. Agitado kaj propagando (Jodko kaj Incerov). 5. Eldonada agado de S. E. U. (Brestlaŭ). 6. Instrua kaj kursa laboro (Polakov kaj Incerov). 7. Organizo de interligo kun eksterlandaj esperantaj organizaĵoj kaj kun S. A. T. (Polakov). 8. Pri Lingva Komitato Sovetlanda (Drezen [kaj Brestlaŭ]). 9. Elektiĝo. 10. Kurantaj aferoj. H. Frank. (El „Bulteno de Centra Komitato de S. E. U.“, n-o 4 [10] majo 1923.)

**Ukraino.**

**Esperanto en Kiev.**

Antaŭ nelonge Kieva Esperant. Societo „Verda Stelo“ organizis en Pedagogia muzeo publikan vesperon, dediĉitan al Lingvo Internacia. Komenciĝis la vespero per la lekcio de s-o J. Skabara: „Lingvo por ĉiuj“ — fundamento, evoluo kaj graveco. La lekcio estis ilustrita per la kantado de kelkaj muzikverkoj en Esperanto. Poste s-o G. Polak traiegis malgrandan raporton pri la nuntempa Esperanta movado kaj fine nia fama samideano s-o V. Devjatin rakontis pri sia tre interesiinda „Vojaĝo per Esperanto“.

La societo organizis ankaŭ propagandajn lekciojn pri Esperanto en la diversaj laboristaj kaj oficistaj kluboj; ĉie la lekcioj havis sukceson kaj en kelkaj lokoj estas jam organizitaj Esperantistaj rondetoj kaj kursoj. Denove komencis funkcii Kieva Instituto Esperanta kiel oficiala regna lernejo. Por la lernantoj estas organizita Esperantista klubo kaj biblioteko. En la proksima tempo estos aranĝota ankaŭ Esperanta Spektaklo. J. Sh.

**Usono.**

**Princeton N. Y.**

Laŭ informo de „New Jersey Post“ la „American Classical League“ kies prezidanto estas s-o A. Flemming-West, dekanato de la „Graduate School“ faris rezolucion, rekomendante la enkondukon de Esperanto en la universitato de Princeton. Ĉar la dekanato mem propagandas nian ideon, la rezolucio sendube havos pli grandan valoron ol ĝenerale.

**Gazetoj.**


- Hungara Esp. Servo sendis liston pri apero de 26 artikoloj pri Esp. en jenaj hungaraj gazetoj: A. Rend, Budapesti Hirlap, Echo de Danube, Magyarország, Nemzeti Ujság, Pester Lloyd, Pestí Naplo — ĉiuj en Budapeŝto; Nagykorós és vidéke en Nagykorós; Friss Ujság en Szeged; Uj Semegye en Kaposvár; Debrecezen Ujság en Debrecezen; Pécsi Lapok kaj Dunántul en Pécs.
- New Jersey Post, Town of Union, 2. 6. Pri Hudson County Esp. Barcho. — Esp. ĉe de Universitato de Princeton. — 9. 6. Du art.
- Essener Allgemeine Zeitung, Essen, 5. 6. Pri Venezia. Die Neue Zeitung, Wien, 28. 5. Pri Venezia. — 9. 6. kaj 16. 6. Pri Aŭstria Kat. Ligo Esp. — 18. 6. Disvestigo de germ. kulturo en eksterlando per Esp. — 25. 6. Signifio de Esp. por la komercisto. — Pri Kat. Ligo. — 29. 6. Esp. kaj radio.
- Der Bund, Bern, 16. 6. art. laŭ „Esp. Press“.
- Reichenberger Zeitung, 7. 6. Esp. kaj radio. — 11. 6. Esp. en nederlanda parlamento. — 20. 6. Esp. reklamo de foiro de Reichenberg.
- Latvijas Sargs, Riga, 14. 6. Esp. kurso ĉe fervoja polico. — 17. 6. Du art. — 19. 6. Du art. laŭ „Esp. Press“. — 21. 6. Longa art. pri Esp. kaj polico. — 28. 6. Pri la XV-a.
- Latvis, Riga, 15. 6. Pri Dekvina. — 22. 6. Esp. kaj polico.
- Rigasche Nachrichten, 14. 6. Esp. kurso ĉe fervoja polico. — 15. 6. Esp. en Francujo. — 21. 6. Pri la XV-a.
- Policias Vesnesis, Riga, 19. 6. Pri Dekvina, laŭ „La Policisto“.
- Lübecker Generalanzeiger, Lübeck, 14. 6. Cirkulero de l' germana ministro por interno pri la XV-a.
- Salzburger Chronik, Salzburg, 22. 6. Klariĝa vespero pri Esp. por instruistoj. — 27. 6. Pri Esp. teatraĵo.
- Salzburger Volksblatt, 15. 6. Esp. en Brazilio.
- Klatovski Listy, Klutovoy, 28. 4. Felietono „Neekspedebila letero“, laŭ ET.
- Obchodni Obzor, Brno, 1. 6. Detala artikolo (jam dua) pri Venezia.
- Ziemia Lubelska, Lublin, 27. 6. Pri nova Esp. kurso.
- Nya Folkets Röst, Stockholm, 16. 6. S-ano Viktor Bonde publikigis svedan tradukon de felietono „La mortado de l' arbo“ de R. Ko, laŭ ET.

**Hungaroj, Poloj, Rumanoj, Rusoj**

uzu la eblecon aboni laŭ malnova tarifo. La abonmentoj devas alveni antaŭ la 15. julio.



# La muzeoj de Nürnberg.



Germana Muzeo.

Malgraŭ sia multokupateco per la kongreso mem, neniu kongresano preterlasu viziti la ĉefvindaĵojn de la kongresurbo, speciale la muzeojn.


La plej fama, granda kaj originala estas la Germana Muzeo. Jam la ĉefkonstruadoj mem estas interesa monumento de mezepoka arto: Kartiaŭsa Monaĥejo, kies preĝejo kaj ĉelaro estas plejparte ankoraŭ konservitaj. Aligis poste diversaj plivastigaj konstruaĵoj, ke ekzistis fine impona ampleksa muzeo kun grandaj kaj malgrandaj haloj, ĉambroj kaj ĉambregoj, kiu jam ekstere vekas la admiron de ĉiu vizitanto. Pli riĉaj ankoraŭ ol la ejoj mem estas ĝiaj kolektoj. Ili enhavas gravajn monumentojn de la tuta germana kulturo. Malofiaĵo estas la prahistoria ekspozicio kaj tiu pri la popolmigrada epoko. Granda parto apartenas al la mezepoka kaj renesanco kun prefere preĝejoj, ekspoziciaĵoj, alie ne videblaj, en armetia, arkitektura, plastika kaj pentrista sferoj. Interesegaj estas ankaŭ la ĉambregoj por mezepokaj domoj, mebloj, vitraĵoj, pokaloj; metode elektita kaj speciale instruiga la riĉa armilaro el iamaj jarcentoj. En alia parto de la muzeo ni trovas kamparanajn ĉambrojn el Sud- kaj Nordgermanujo, kompletan kolekton de la diversregionaj popolaj kostumoj, bedaŭre malaperantaj pli kaj pli kontraŭ la monotona urbana vestaĵo. Ankaŭ la historia kostumaro estas tre instruiga. Plue ni mencias la unuan terglobon de Martin Behaim kaj la apudan historian apotekon kun la pitoreska laborejo ktp. Specialan atenton meritas la pentraĵgalerio, kiu enhavas krom nederlandaj artaĵoj belegajn originalpentraĵojn de la plej famaj germanaj majstroj.

Tre vizitinda estas plue la Armetia Muzeo kiu — simile al la „South Kensington Museum“ en London — celas montri la vojon al bonstila kreado kaj plibonigi samtempe la artecan guston de la publiko. Krom armetiaj antikvaĵoj kaj modelaro de plej bonaj iamaj diverslandaj kreitaĵoj, ĝi enhavas ĉefe modernajn. La ĉefparto de tiu ĉi kolekto estas la ĉambregoj kun la distingaj okcidentaj kaj orientaj laboraĵoj keramikaj, la kolektoj de belegaj diverspecaj vitraĵoj, de multvaloraj metalaĵoj, lignaj ĉizaĵoj, emajlaĵoj, ledajoj, teksaĵoj kaj brodaĵoj. Por peri la konon de la plej novaj artecaj akiritaĵoj al la armetiuloj kaj pliperfektigi ilin laŭ la postuloj de la nuntempo, la direkto de la muzeo aranĝas ĉiujare tielnomatajn „Majstrokursojn“, kiu per siaj bonega organizo, modelaj instalaĵoj kaj riĉaj rimedoj estas vera fortecentro por la bavara metio.

Tria „muzeo“, kiu ĉiu artamanto kun amo kaj respekto eniras, estas la „Dürer-Domo“, kie la plej granda germana artisto kreis kelkajn nemortebajn verkojn kaj ankaŭ finis sian ageman, vivon. Jam arkitekture interesa kiel tiipa Nürnberga domo, ĝi enhavas de la supraj etaĝoj valorajn vidindaĵojn. La lignajaj vandojn ornamas bildoj kaj portretoj, kiu alludas la personon de la glora kreinto same kiel diversaj elmontraj kestoj kun familiaj dokumentoj. Krom tio prezentigas al ni la tuta verko de Dürer parte en originalo, parte en bonaj kopioj: gravuraĵoj, akvareloj, desegnaĵoj, idiliaĵoj kaj freskoj. Kun admiro ĉiu rigardas ĉi tie kvazaŭ la resumon de lia artisto vivo, emocie starante same kiel en la hejmoj de Luther, Goeihe aŭ Beethoven.

Kiel Nürnberg, la mezepoka juvelo de Germanio, estis inda stareaĵo por la Germana Muzeo, tiel la naskiĝurbo de la unua kontinenta fervojo (1855) prave fondis „Trafikmuzeon“, por kolekti kaj konservi al postaj generacioj la memorajn objektojn kaj originalaĵojn el tiu frua epoko de la fervoja trafiko. Jen ankaŭ kompleta kolekto de laŭnaturaj fervojaĵoj modeloj, prezentanta kvazaŭ la historian evoluon de la unua lokomotivo „Aglo“ ĝis la hodiaŭa stato. Saminstrue laŭ historia kaj konstrua vidpunkto, estas montrata la evolucio de la personaj kaj ekspedaj vagonoj, de la haltigiloj, sekuraj kaj signalinstalaĵoj. En aliaj ĉambregoj ni povas studadi la fervojajn stacidoman kaj pontan konstruadon, lumigadon, laborejojn, elektrotrejnadojn kaj diversajn socialajn instituciojn por la fervojistaro. Ankaŭ la surakvaj trafikiloj, modeloj de la unuaj primitivaj ŝipaĉoj ĝis la plej moderna kaj komforta vaporŝipo estas videblaj. Rondiro tra poŝti-, telegraf- kaj telefoninstalaĵoj kompletigas la imponan impreson de la muzeo, speciale interesa por poŝtistoj fervojistoj.

„Last not least“, kiel diras niaj anglaj samideanoj, ni mencias la „Turmentan Ĉambrojn“, kiu estas lokita en la kastelo kaj prezentas timigan dokumento de la mezepoka krueleco. Fondite komence de la 19-a jarcento, ĝi enhavas amason da iloj, skribaĵoj kaj bildoj el la tempo de la plej barbara juro, kiam regis ankoraŭ la hispana inkvizicio (Karolina) en germanaj landoj. Specialaĵo estas la „Fera Virgulino“, terura mortiginstrumento. Ĝi havas la formon de honorinda matrono el la deksepa aŭ deksepa jarcento kun rigida krispa kolumo kaj glate malsupreniganta vesto, kiam tiam kutime surhavis la Nürnbergaj sinjorinoj. La mantelo de la figuro estas ligna, sed malfermite ĝi prezentas en la interno terurajn pikilojn pretaj por labori kaj dispecigi la kompatindan viktimon. Cetero, tiu ĉi mistera turmentegilo estas postfaritaĵo el la 19-a jarcento, entuziasmigaĵa je timiga romantiko. „Fera Virgulino“ neniam ekzistis. Tia malsimpla kaj ruzega krueleco tute ne estis karakterizaĵo de la Nürnberga magistrato, kiu eĉ mildigis kaj nuligis diversajn krueleajn mezepokajn punojn.



Domo de Dürer.

Dr. Richard Ledermann.

Nürnberg ĉesigi Internacian Asocion de Instruistoj, aliĝi al Pedagogia Sekcio de I. S. A., kaj uzi „Internacia Scienca Revuo“ kiel organon. Ĉiuj geinstruistoj devus kolkti sin en la naciaj korporacioj de I. S. A. Necesegaj estas pli grandigi la Ped. Sekcion per unuigo de ĉiuj kolegoj. Tiam oni certe atingus tuj milojn, kiuj utilas al la fako kaj samtempe al I. S. A. kaj ĝia organo. Estas senkuraĝiganta afero, ĉiam legi la malgrandan nombron de kolegoj en organizado, se oni certe scias, ke ekzistas tri- aŭ kvadrabla nombro de ili. Nuntempe estas favora momento, ĉar I. A. I. perdis sian prezidanton des pli facile ĝi povas emite aliĝi al I. S. A. pro tio: Gekoleguloj, egu decide, antaŭenpuŝu nian organizacion en I. S. A. kaj alifirig vian gekonaton! Kiu samopinias nepovante viziti Dekkvinan, tiu skribu tuj al mi, por ke mi povu montri grandan nombron de subtenantoj.

Albrecht Naumann, Gedächtnisplatz 2, Werdau, Sa., Germ.

Ĉu Esperantisto estas sinonimo de regionismo? Mi legis sur iu Esp. gazeto pri la „Antaŭkongreso en Paris“, ke la kotizo estas fluita: 5 flk. francaj por la francoj kaj be'goj; 5 flk. sv. por la svisoj, 1 dolaro por la amerikanoj ktp.; por la hispanoj kaj katalunoj 5 pesetoj.

Sur la lasta numero de ET, pri elekto en la Akademio, mi legas inter la diverslingvanaj akademianoj ankaŭ „frula“ kaj „kataluna“. Ambaŭ estas dialektoj de latinidaj lingvoj, nur konataj en la regionoj, kie la popolo ilin parolas, sed tute ne konata en la mondo; kaj la reprezentantoj de la itala kaj hispana lingvoj estas sufiĉaj. Se ni volas esti pedantoj, ni devus havi ankaŭ reprezentantojn de baska, irlandaj, ĉimbra kaj aliaj tiel nomataj „lingvoj“. Koncerne la antaŭkongreson en Paris, mi demandas: Ĉu la katalunoj ne apartenas al Hispanio? Kial do ne diri: la hispanoj, katalunoj, baskoj, andaluzoj ktp. pagas 5 pesetojn; la italoj, lombardoj, piemontanoj ktp. pagas 5 lirojn; la britoj, angloj, irlandanoj, skotoj ktp. pagas 2 ŝi.; la svisoj, bernanoj, ĉiĉinanoj, ĝenevanoj ktp. 5 sv. frankoj ktp. ktp. Estas juste, ke enlande oni distingas la diversajn regionojn, sed en internaciaj kunvenoj aŭ societoj estas stulte emeti regionismon.

Ankaŭ dum la internaciaj kongresoj oni rimarkas, ke ĉiuj fanatikaj „regionistoj“ profitas de Esperantujo por elstari sian politikejn ideojn. Svislando konsistas el 25 diversaj ŝtatoj kun 4 lingvoj, sed kiam ni estas en eksterlando, ni diras simple, ke ni estas svisoj. Esperantujo devus unuigi kaj ne disigi la popolojn. Is.

## Niaj aldonoj.

La venonta numero de „Internacia Komerc“ aperos la 22. julio. Pro teknikaj kaŭzoj en julio ne aperos „Revuo“: la venonta numero aperos en aŭgusto. Estonte „Revuo“ estos 16-paĝa.

## Internacia Sporto.

**La sportbataloj en Göteborg**  
komenciĝis. La unuan fojon depost la milito ankaŭ germanoj partoprenas tiujn ĉi internaciajn batalojn, kiujn tamen ne partoprenas francoj kaj belgoj. La kuron je 800 m gajnis la svedo Johansson en 1:37.5 min., la 400-m-barilkuron la finno Vilen en 55.5 sek., la 3000-m-kuron la svedoj Viede kaj Bakmann en 15:8.4 min. La antaŭensalton gajnis la finno Tuukoos per 7.31 m.

### Boksado.

En la boksbatalo Germanujo-Britujo venkis la germanoj Breitensträter, Prenzel kaj Naujoks; malvenkis la germano Rolaufs. Rezultaj 5:1 por Germanujo.

### Biciklado.

Venkinto en la svisa majstreco sur ŝoseoj (Lausanne, 150 km) restis Henri Guilloid en 4:40.15.2 horoj.

### Ĉevalkurado.

La germanan Derby-kuradon (2400 m en 2:41.5 min.) gajnis en Hamburg aŭtaĵo 109.000 rigardantoj Augias (O. Schmidt) de A. & C. Weinberg.

### Naĝado.

La 27. 6. s-ino Leopolda Murková, edzino de advokato en Praha, transnaĝis en 4 1/2 horoj la 14 km larĝan kolkolon inter la kuraĉloko Novi kaj insulo Krk (Veglia) en Adriata maro. La sinjorino atingis la insulon Krk post longaj longaj naĝado en tute freŝa forto kaj revenis al la kuraĉloko Novi per boato. En la kuraĉloko la publiko renkontis la bravulinon per longaj aklamoj kaj aplaŭdoj. Skito.

### Piedpilklo.

Landan ludon Svisujo-Danujo en Köbenhavn gajnis Danujo 3:2 — Landan ludon Svedujo-Germanujo gajnis Svedujo 2:1 (paŭzo 0:1).

## Kongresanoj, vizitu Ĉeĥoslovakion!

Pasporta vizo por duona prezo.

La XV-a okazos tre proksime de ĉeĥoslovakaj limoj; post kelkhura fervoja vojaĝo vi estos en Praha, la ĉefurbo de Ĉeĥoslovaka Respubliko, la fame bela urbo de la XIII-a. La Esp. kluboj de Praha sincere invitas la tutmondajn samideanojn al multnombra vizito de la ĉeĥoslovaka ŝtato kaj ĝia ĉefurbo. Ili zorgos dum la antaŭ- kaj postkongresaj tegoj pri gvidado tra la urbo kaj tra ĝia pentrida ĉirkaŭaĵo. Ili ankaŭ plifaciligos la loĝigajn aferojn.

Ne preterlasu la favoran okazon viziti la „kron de Eŭropo“! Por eĉ ne iom malutili al la sukceso de nia XV-a, ni decidis ne erangiĝi antaŭ Postkongreson; ni ankaŭ ne postulas kotizaĵon, por fari la vizion laŭeble plej facila kaj malmultekosta.

Anoncu ĝustatempe vian alvenon al la Esperantista Klubo en Praha I, Pŝkop I, Edison. Antaŭ la forveturo el via hejmo prizorgu la ĉeĥoslovakajn vizon, en landoj kun meza aŭ malbona valuto vi ĝin ricevos por duona prezo montrante la kongresan karton.

## Leterkesto de ET.

V. P. en Nalĉik. — Kun bedaŭro ni aidas, ke vi ankoraŭ ne ricevis la nomon, kiun ni transdonis por vi al komitato en Berlin. Ni admnis kaj esperas kontentigan rezulton.

C. A. F. en London S. E. 24. — Jes, vi estas prava. Nia averto estis eraro. Bonvolu pardonni! H. A. en Kimberby. Ĝis nun ni konis la firmon fidiinda. Ni tuj skribos al ĝi, kaj esperas ke oni kontentigos vin. Multan feliĉon en la nova mondo!

P. P. en Valk. — Koran dankon por verbaĵo de abonantoj. Ni skribis rekompencon en vian konton 5 n-ojn.

Por nia Esperanta fako ni serĉas fidindan kaj pruviĝan kompostiston. Ĉe kontentiga laboro la posteno estos daŭra kaj agraba! Presejo T. & H. Jung, Horrem bei Kö'n, Germanlando.

Mandesegnoj! Kontraŭ 2 ŝil., 1 guld., 2 sv. kr., 1 peso, 1 yen, 2 pesetoj, 2 sv. frank., 1 dolaro, 10 liroj en rekomendita (ĉestristra) letero. — Ali Akber Ehm, oficejestro, poŝtfako 105, Zittau/Sa. (Germ.)

## Pruvoj instruas plej bone!

ke vi aĉetas bonŝtofajn pantalonojn ĉiusepacajn ktp. plej profite ĉe mi. Inter aliaj skribas s-o P. S. P. en Sheffield (Anglujo): „mi devas laŭdi vin pro la bona formo kaj la bona maniero, kiel vi faris la pantalonon...“ Simile esprimas sin ankaŭ aliaj klientoj.

## Tial provu ankaŭ vi!

Facile komprenebla mezur-sistemo. Malaltaj prezoj. Baldaŭna livero. Eksperto ĉiulanden. Malkara send-kostoj. Ankaŭ vendado de ne prilaboritaj ŝtofoj. — Postulu detalan oferton kontraŭ poŝtmarkoj aŭ stamoloj, resp. kup de Joh. P. Schmidt, Zittau i./Sa. 85 (Germanl.) Esperanto uzata!

P. T. T.-istoj atentu pri la via fakrevuo „La Interligilo de P. T. T.“ Sindikata, monata, internacia, teknika. Abonu-kunlaboru! Abono-principe: kvarono de la laborista salajro, senpage por la konstantaj korespondantoj; mendu tuj specimenon kaj gvidadon al Petro Filiâtre 54, Rue Custine Paris XVIII

## Nekrologo.

Merkredon, 6-an de junio, Creson C. Coigne, mondkonata 22-jara Esperantisto de New York memmortiĝis sin en sia hejmo en Brooklyn. Lia fianĉino, Fraŭlino Stephanie Duda, kiu venis antaŭ kelkaj jeroj de Polujo, ĵus estis mortinta de kormalsano kiam s-o Coigne iris al la banĉambro, enŝlosiĝis malfermis la gastubon kaj baldaŭ estis mortinta, antaŭe ke aliaj estis suspektaĵoj kaj rompis la pordon. Li helpis organizi la „Esperanto Serva Korporacio“ kaj estis ĝia sekretario. Li postlasas bonegan monumenton en la kolektado de preskaŭ tricent Esperantaj libroj, kiujn li donacis al la Publika Biblioteko de New York dum la pasintaj ok aŭ dek jaroj. Li farigis fervora Esperantisto dum ĉi estis ankoraŭ juna knabo.

## Parolejo.

185. Tutmonda instruistaro kaj XV-a. Jam de longe mi pensis, ke granda perdo de fortoj estas la aparta ekzistado de diversaj organizaĵoj. Preciĉe en la rondo de geinstruistaro oni devas konstati tion. Ekzistas Internacia Asocio de Instruistoj kun oficiala organo „Internacia Pedagogia Revuo“ kaj Pedagogia Sekcio en Internacia Scienca Asocio kun oficiala organo „Int. Scienca Revuo“. La unua estas fondita dum Dektria 1921 en Praha. Ĉeestinte la koncernan kunsidon mi pensas esti rejligata, eldiri jenajn vortojn. Ricevinte la unuan kalendaron de „Int. Ped. Revuo“ mi surprizite legis la malgrandan nombron de aliĝintoj. Tia organizaĵo ne povas esti forta en la batalo por nia afero. Intertempe okazis la fondiĝo de I. S. A. Neniu oni aidis plu pri I. A. I. Mi nur ricevis post grandega prokrasto mandukitan kalendaron (anstaŭtanta 4 n-ojn) kaj fine dumnumeran. Ĉu ankoraŭ nun ekzistas „Int. Ped. Revuo“? Iu organo ne estas valora por nia movado. Por kolekti ĉiujn fortojn el la nia rondo, mi proponas al la venonta kunveno de geinstruistaro dum Dekkvina en Ĉiu, kies abono finiĝas antaŭ n-o 155, ricevis admonilon kaj riskas interrompi de la liverado, se li ne tuj plilongigas la abonon minimume ĝis 155.



**Sanatorio en Ĉeĥoslovakio serĉas lertan Esperanton**  
 kiu estas kapabla aranĝi paroladon pri nova kuracmetodo de „Tuberklozo“. Oni sin anoncu al Komercia Instituto „Esperanto“, Jägerndorf (Ĉeĥoslovakio)

**„THE OPEN ROAD“**  
 Eldonata la unuan de ĉiu monato, 3 d. po numero. La gazeto de Skotlando, Naturscienco kaj Eksterdomismo.  
**Internacia Cirkulado**  
 Esperanto kaj Eksterlanda Fako, al kiu korespondantoj tra la mondo kontribudas.  
**Celadas Ligon de la Homaro.**  
 Sendu vian larabonon de tri anglaj ŝilingoj (malbonvaluta lando) aŭ de kvar ŝil. (bonvaluta lando) al la administranto „The Open Road“, Denison House, 296 Vauxhall Bridge Road, London S. W. 1, Angl.

**Konstantinopola Komercservo**  
 W. Zielinski  
 Galata, Pantelejmon han Konstantinopolo.  
 Ĉiusepcaj komercaj aferoj kaj informoj. Eksperto de enlanda produktado: lano, kotono, tabako, optimo, sekaj fruktoj, nuksoj, orientaj dolĉaĵoj.

**Anoncetoj.**

**EDZIĜO.** — Okaze de edziĝo de nia grupestro Kurt Kanzler kun f-ino Maria Wiedenhofer, ambaŭ en Wiesdorf, la estro deziras, ke ili atingu altan aĝon kaj ilia estonteco grupu benata per granda nombro da Esperantistoj. [1]  
**MORTO.** — La 21. junio mortis post mallonga turmenta malsano s-o Gr. Stasys Dalavantas en Rokiškis (Litovio). Malaperis fervora Esperantisto, fondinto kaj subtenanto de Esperanto-grupo en loka maliberio. [1]  
**PROMOCIIO.** — S-o D. Halbedl en Graz (Aŭstr.) estas promociita doktoro de li juraj kaj politikaj sciencoj la 2-junio 1923. [1]  
**EDZIGPROPONO.** — Du junaj poŝtofciistoj serĉas per tio du junajn eksterland-Esperantistinojn por posta edziĝo. Oni bonvolu sendi seriozajn lerterojn kun foto. Seriozaj fraŭlinoj skribu al Hans Strehmel, Holbeinstr. 159 en Dresden 19. [1]  
**ĜESPORTISTO!** Por pravi la valoron de la lingvo Esperanto, unuigu por interkomunikado pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj en sporto de via lando por presi ilin en naciaj sport-gazetoj. Sendu al mi vian adreson, ke ni povu ordigi niajn estontajn interrilatojn, laŭ la adreso: A. Jigarov, Szezenka, Streljički per, 14 kv. 13 en Moskva, (Ruslando) [1]  
**LINLAN NUMERON** el 1922 de Literatura Mondo serĉas la eldonejo de L.M en Budapeŝt VI. Andrássy-ut. 81. Reciproke oni tuj sendas du novajn numerojn. [1]  
**KIU BEZONAS** Gablonzajn ornamatajartiklojn, turnu sin al Rudolf Lang, Augasse 67 en Gablonz a.N. (Ĉeĥoslov.). Mi liveras ĉiujn artiklojn, prizorgas aceton kaj informas senpage pri komerco. [1]  
**KURACISTOJ!** Esperante, ke ekzistas ankoraŭ kuracistoj-bonuloj, mi kuraĝas petegi helpon de ili por mia kara fraŭno danĝere malsana. En sia stomako kreskas ulcero, kaj ŝi estas korpe malforta kaj havas malmulte da sango. Cu ekzistas helpe kontraŭ ĉi tiu malsano? Kiel kuraci ĝin? Estimaj i-s-oj kuracistoj! Helpu! Mi estos ire danka al vi. — Antonin Wagner, razisto, ĉe s-o Hlaváček, en Jicin (Ĉeĥosl.). [1]  
**BLUKEDO.** Kolekto de naŭ rakontoj originalaj kaj tradukitaj de diversnaciaj aŭtoroj (Baghy, Bulthuis, Hohlov k.a.). 88 pĝ. kart. Prezo 1 sv. fk., malbonv. 1 gmk. X ŝlosila. ET-abonantoj 3 ET-numeroj de la abonkoto. Mendo ĉe „Esp. Triumfonta“ en Horrem bei Köln, Germ. [1]  
**LA RAPORTO** de la Ligo de Nacioj pri Esperanto kiel internacia lingvo en sveda itraduko ricevebla ĉe Eldona Societo Esperanto en Stockholm 1, (Sved.) kontraŭ ensendo de 1 sv. fk. [1]  
**FILATELISTOJ!** Kiu sendas al mi 100—1000 poŝtmarkojn sialandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ lvert 1923. Gabriel Alomar, Prez. de EKP, str. Vallori 14 en Palma de Mallorca (Hisp.). [6]  
**JUNA SERURISTO** serĉas laboron. Kie? — egale! Bonvolu skribi al Rupert Hillebrand en Bad Reichenhall (Germ.) Tirolerstr. 7. [2]

**Pri la XV-a.**

NI BEZONAS ses ĉambrojn por dekunu personoj. Ili devas esti en privata plejura kaj komforta domo, se eble, ĉiuj en sama konstruaĵo. Komuniku prezon tuj al J. Applebaum, 11, Mayville Rd, Mossley Hill, en Liverpool (Anglujo). [1]  
**Korespondado kaj Interŝanĝo.**  
 Kontraŭ 100—200 diversaj poŝtmarkoj sendas samkvanton da rumanaj: S-o Samuleo Szentkirályi, direktoro de Scoola Superiorea de Comeret en Cluj (Ruman) [2]  
 S-o Gösta Henriksson en Sandviken (Sved.) deziras korespondi lere aŭ poŝtkarte kun fraŭlinoj de la tuta mondo [2]  
 Deziras interŝanĝi pm. el Italujo kaj kolonioj kun pm. el Balkanaj landoj Luigi Bruzzone, 19—10 Piazza Sarzano, en Genova (Italio) [2]  
 Deziras interŝanĝi pm. el Italujo kaj kolonioj kun pm. el Danzig, Memelgubiet kaj Baltikaj landoj. — Mario Piazza, 15—2, via Ponte Carignano, en Genova (Italio) [2]  
 S-o Jozef Škabara, Krešćatik 35, en Kiev (Rusl.) deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. kun ĉiujlandaj samideanoj. Volonte mi akceptas poŝtmarko-katalogojn kontraŭ sovejaj aŭ rusaj pm. malnovaj. [2]  
 S-o Vittorio Bonavia, en Spalato (Jugosl.) interŝanĝas pm. (50—100 pecoj) kun la tuta mondo, escepte Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo kaj Polujo. Mi resendas samkvante kaj samvalore de jugoslavaj pm. Ne sendas unue. [2]  
 F-ino Helene Enke Rockwitzstr. 9, 1 en Dobritz b. Dresden (Germ.) deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. Sendu nur bonajn, sufiĉe grandkvante, sed ne bagatelajn. [2]  
 Fraŭlo Boris Burakow, Nowe miasto ul., Slawkowska n-o 1, en Nieswiez (Polujo) deziras korespondi kun la tuta mondo per lerteroj kaj il. pk. Interŝanĝas pm. [2]  
 S-o Dr. Holas, juĝisto, Anenská 10 en Brno (Ĉeĥosl.) deziras interŝanĝi il. pk. kaj pm. kun ĉiuj landoj. [2]

F-ino Kuracistino Ruth Davis, 550 Kings Highway, Brooklyn, N. Y., U. S. A., volas korespondi kĉl. pri kuracistaj kaj socialaj temoj. [2]  
 F-ino Ireno Schwarz, Sobinovska ul. 55, en Prešov (Ĉeĥoslovakio) deziras korespondi kun ĉiujlandaj Esperantistoj, kolektas il. pk. (H. I.) [2]  
 Fraŭlo 50-jara deziras korespondi kun serioza fraŭlino por posta edziĝo. Proponon al Edmundo Vincze, ofiĉisto en Caransebes (Rumanio, Banat). [1]  
 Elémemer Lövei, en Kaosvárs, Géra ut. 9 (Hungarujo) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermon kun ĉiuj landoj. [1]  
 Ali Akber Ehm, oficejesto, poŝtfako 105, en Zittau-Sa. (Germ.) deziras korespondi kun la tuta mondo per let. kaj il. pk., interŝanĝas pm. kaj gazetojn Esperantistajn. [10]  
 S-o V. A. Larjuk, ĉe Vostrebovanja, en Novonikolajevsk, Siberio (Rusl.) deziras korespondi per let. pk., interŝanĝas pm. [1]  
 S-o Fr. Bachmann, Bahnhofstr. 5/1., en Heilbronn a. N. (Germ.) deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj poŝtkarte kaj le'ere pri politiko, popolscienco kaj ekonomio. [1]  
 S-o Franz Tischer, en Unter-Jamny b/Teusing (West-Böhmen, Ĉeĥosl.) deziras korespondi per let. aŭ pk. kun geekster-eŭropanoj, interŝanĝas ankaŭ gazetojn Esperantajn. [1]  
 Oficista grupo deziras korespondi kun geoficistoj kaj grupoj, por interŝanĝi interesajn informojn pri profesiaj problemoj. Adreso: La Verda Standardo, B.S.H.N. Korte Nieuwstraat 44, Antwerpen (Belguj). [1]  
 S-o František Trnka en Kuná Hora - Hlouška 4 (Ĉeĥosl.) deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. pri urboj (filatelista afranko) kun ĉiuj landoj, precipe Aŭstralio, Afriko, Hindujo, Rusujo, Ĥinujo, Tibeto, Palestino ktp. [1]

Poŝtmarkojn el orientaj landoj vi plei malkare acetos ĉe Eldonejo „Esperantista Voĉo“, en Jaslo (Pollando). NI sendas pm.-elektojn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mon-depono. Interŝanĝas pogrande; fusosendadoj malakceptata. [17]  
 S-o Henri Rathé, Brugstraat 54, en Adinkerke (Belgujo) deziras korespondi kun aliaj landoj: kolektas pm., il. pk., papermonon. [1]  
 S-o P. S. Serebrjakov, Poŝtamt de Vostrebovanja, Kazanj, (Ruslando) deziras korespondi kaj interŝanĝi let., il. pk., (bfl.) pm kun ĉiuj landoj. [1]  
 Atentu! Nedko II. Zelenodravski, Orlovka 66, en Gabrovo (Bulg.) deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo, kun gestudentoj en Berlin, München, Hamburg, Frankfurt a. M kaj Dresden. [1]  
 Isaj Dratver, en Warszawa, Muranowska 26/52 (Polujo) sendas por 1 svisa franko (aŭ egalvaloro) 15 sovejajn kaj 10 polajn poŝtmarkojn. Ĉiuj bonvalvitaj, nedifektaj, diversaj Ankaŭ interŝanĝas pm. il. pk. kaj korespondas [1]  
 F-ino Sigríd Carlén, Ixhull, Kumla (Svedujo) deziras korespondi per il. pk. kun ĉiuj landoj, escepte Germanujo kaj Anglujo. [1]  
 S-o Einar Dahl, Nybrozatan 14, en Falun (Sved.) deziras korespondi kun ĉiuj landoj. [1]  
 Max Wahnschaffe, en Ansbach (Bav. Germ.) O. Markt 25, deziras interŝanĝi ĉ. 40—60 nur bonajn pm. kun seriozaj kolektantoj en Nederlando, Latvujo, Litovujo, Finnlando, Italujo, Jugoslavio. [1]  
 S-o A. Demin, Lermontova 33, en Novonikolajevsk, Siberio (Ruslando) interŝanĝas pm., let. kaj il. pk. [1]  
 S-o Willi Madaus en Perleberg (Brandenburg, Germanujo) Poŝtfach deziras interŝanĝi pm. kaj papermonon. [1]

**Kongresanoj por la XV-a:**

- 3401. Idiago Frieda, s-ino, Zaragoza
- 3402. Lundell Lenart, Malmö
- 3403. Anderson Ernst, Kulleedal
- 3404. Ojander Yrjo, Helsinki
- 3405. Löfgren Frans, Malmö
- 3406. Wünsche Anna, s-ino, Plauen
- 3407. Weig Maria, f-ino, Nürnberg
- 3408. Knappe Grete, f-ino, Hof
- 3409. Dahms Otto, Plauen
- 3410. Schopper Georg, Zirndorf
- 3411. Schopper Anjo, s-ino, Zirndorf
- 3412. Kraus Friedrich, Regensburg
- 3413. Speil Michel, Regensburg
- 3414. Kress Babette, f-ino, Zirndorf
- 3415. Fritzscheing Kurt, Caracas
- 3416. Egg Alfred, Rieden
- 3417. Hamme Hans, München
- 3418. Scherer Martin, München
- 3419. Siegler Ferdinand, Mainz
- 3420. Heikinen Helmi, s-ino, Vainikkala
- 3421. Müller August, Nürnberg
- 3422. D-ro Luppe, Nürnberg
- 3423. Treu, Nürnberg
- 3424. Dürr, Nürnberg
- 3425. Wol'ram, Nürnberg
- 3426. Dr. Eickemeier, Nürnberg
- 3427. Mayer Eugen, Nürnberg
- 3428. Heitzel Hermann, Nürnberg
- 3429. Richter Hermann, Nürnberg
- 3430. Weiss Friedrich, Nürnberg
- 3431. D-ro Hofmann Hans, Nürnberg
- 3432. Geyer Betty, f-ino, Nürnberg
- 3433. Wagner Max, Nürnberg
- 3434. Miltch, f-ino, Nürnberg
- 3435. Guncék G., Plevén
- 3436. Hristova Alixa, Plevén
- 3437. Lamikas Jonas, Panevezys
- 3438. Mlacerni J., Kovno
- 3439. Tenkanen Heikki, Raivola
- 3440. Rödel Ernst, Erlangen
- 3441. Mu'ot Clara, f-ino, Erlangen
- 3442. Steinsdörfer Josef, Haid
- 3443. Wenkoff Dimir, Leskowetz
- 3444. Wuttig Paul, Berlin
- 3445. Jaeger Herbert, Berlin
- 3446. Kuhn Robert, Berlin
- 3447. van Acker August, Lembeke
- 3448. Racz Andreo, Kaosovar
- 3449. Käufel A., Nürnberg
- 3450. Kappeler Adolf, Marburg
- 3451. Ganszange Mária, f-ino, Helsingfors
- 3452. Frankenbacher Jakob, Nürnberg
- 3453. Frankenbacher Emma, s-ino, Nürnberg
- 3454. Lendwirth Josef, Krakau
- 3455. D-ro Schwarzbaj Adolf, Krakau
- 3456. Puerta Fernandez Manuél, Eibar
- 3457. Puiz Rudolf, Nürnberg
- 3458. Mayerhausen Fritz, Reichenhall
- 3459. Tvirtun Tadeo, Ponevezys
- 3460. Löhr Emma, s-ino, Nürnberg
- 3461. Parker Marie E., f-ino, Shipley
- 3462. Barth Charlotte, f-ino, Dresden
- 3463. Steint Lyyll, f-ino, Helsinki
- 3464. Stenkievič, Mečilav, Sofia
- 3465. Partofs, Ceno, Vratza
- 3466. D-ro Prybucki Lazar, Lodz
- 3467. Kennedy Annie, f-ino, Glasgow
- 3468. Ešrefov Edhem, Buzin
- 3469. Atanasov Ivan, Russkio
- 3470. Bruder Georgo, Fűrth
- 3471. Arabeno Michele, Genova
- 3472. Segre Vittoria, f-ino, Genova
- 3473. Samideano el Nbg.
- 3474. Cazzola Giuseppe, Milano
- 3475. Quadrelli Giuseppe, Milano
- 3476. Spera Mario, Milano
- 3477. Grancini Elvira, f-ino, Milano
- 3478. Rattel Willi, Zirndorf
- 3479. Neusinger Martin, Zirndorf
- 3480. Maria Shigeo, Tokio
- 3481. Reizes Dora, s-ino, Lemberg
- 3482. Wollisch Jakobo, Lemberg
- 3483. Wollisch Sofio, f-ino, Lemberg
- 3484. Deurling Karl, Fűrth
- 3485. Spiry Elek, Budapest
- 3486. Hürlein Georg, Nbg.
- 3487. Fürst Josef, Nbg.
- 3488. Schiesener Willi, Charlottenburg
- 3489. Seiffert Alfred, Charlottenburg
- 3490. Zwanischaf Boris, Dresden
- 3491. Allen Luis, Toronto
- 3492. Mally Emil, Nbg.
- 3493. Brolund Maria, f-ino, Gävle
- 3494. Schindler Julie, f-ino, Teschen

- 5495. Skulina Louise, s-ino, Teschen
- 5496. Becker Karl, Magdeburg
- 5497. Mikšfäth Marie, f-ino, Hallein
- 5498. Reichenbacher Kurt, Apoldo
- 5499. Stevens Karel Max, s-Gravenhage
- 5500. Rosseel Jacobus, s-Gravenhage
- 5501. Platiel Josef, Landshut
- 5502. Elsner Margarete, f-ino, Bln.-Karls-
- 5503. Berten Hans, Chemitz [horst]
- 5504. Schubert Walter, Chemnitz
- 5505. Ebner Friedrich, Klosterneuburg
- 5506. Kubr Maria, f-ino, Klosterneuburg
- 5507. Schauer Anton, Klosterneuburg
- 5508. Dworschak Hedwig, f-ino, Klosterneuburg
- 5509. Klement Maria, f-ino, Klosterneuburg
- 5510. Binker Ambros, Klosterneuburg
- 5511. Birr Ferdinand, Klosterneuburg
- 5512. Fliedl Karlo, Klosterneuburg
- 5513. Eriksson Mimi, f-ino, Gävle
- 5514. Eriksson Karin, f-ino, Gävle
- 5515. Höcker Georg, Muschelwitz
- 5516. Berg Gustav, Frankfurt a/M.
- 5517. Auerbach Jozef, Lwow
- 5518. Auerbach Sabina, f-ino, Lwow
- 5519. Wel'er Leonia, f-ino, Lwow
- 5520. Schnitzler Hermann, Lwow
- 5521. Müller, Werdau
- 5522. Albert Karl, Sebnitz
- 5523. Salonen Arvo, Hallikko
- 5524. Applebaum J. D., Liverpool
- 5525. Applebaum Clara, s-ino, Liverpool
- 5526. Applebaum Erik S., Liverpool
- 5527. Applebaum Rita, f-ino, Liverpool
- 5528. Megahy P. Basil, Fulwood
- 5529. Megahy M. Sarah, s-ino, Fulwood
- 5530. Sinclair Dorothy, f-ino, Fulwood
- 5531. D-ro Filch Arthur, Liverpool
- 5532. Fitch, s-ino, Liverpool
- 5533. Pimbello Mario, Mentova
- 5534. Kohlmann Betty, f-ino, Nürnberg
- 5535. Hoffmann Hedwig, f-ino, Nürnberg
- 5536. Biersack Anni, f-ino, Nürnberg
- 5537. Schoenbals Elisabeth, f-ino, Qued-
- 5538. Schübale Karl, Weisweil [linburg]
- 5539. Theodore Mary, s-ino, Shrewsbury
- 5540. Ezers Karls, Riga
- 5541. Petrich Robert, Nürnberg
- 5542. Ruoff Georg, Nürnberg
- 5543. Ruoff Heinrich, Nürnberg
- 5544. Binder Adolph, Nürnberg
- 5545. Conrad Ludwig, Nürnberg
- 5546. Reingruber Hans, Nürnberg
- 5547. Reingruber Leo, Nürnberg
- 5548. Herzog Otto, Nürnberg
- 5549. Bieringer Hans, Nürnberg
- 5550. Gelernter Baruch, Nürnberg
- 5551. Berger Josef, Nürnberg
- 5552. Sierf Marie, s-ino, München
- 5553. Bruckmoser Adolph, s-o, Bayr. Gmain
- 5554. Rieser Josef, Bayr. Gmain
- 5555. Hillebrand Rupert, Bad Reichenhall
- 5556. Tamverk Paul, Haapsalu
- 5557. Viid's Alide, f-ino, Nomme
- 5558. v. Siltk Elfriede, f-ino, Tallinn
- 5559. Nurm Berta, f-ino, Tallinn
- 5560. Mikkelsen Erna, Tallinn
- 5561. Kaminskj Alide, f-ino, Tallinn
- 5562. Grünthal Johannes, Haapsalu
- 5563. Walter Willem, Tallinn
- 5564. Birk Augusto, Tallinn
- 5565. Otsuki Shinji, Neuilly
- 5566. Fousková Marie, s-ino, Preloùc
- 5567. D-ro Fousek Josef, Preloùc
- 5568. Jackel Herbert, Kroschwitz
- 5569. Traudisch Johann, Hamburg
- 5570. Zys Julian, Lodz
- 5571. Zys Eugenia, s-ino, Lodz
- 5572. Haidler Xaver, Kohlstadt
- 5573. Tiard Charles, Paris
- 5574. Tiard Marelle, s-ino, Parc St. Maur
- 5575. Spenczer Fritz, Barrien
- 5576. van Tinteren, W. H. G. Amsterdam
- 5577. Hast. Jan Leendert, Amsterdam
- 5578. Aalders Anna, f-ino, Amsterdam
- 5579. Meyns Hilda, f-ino, Amsterdam
- 5580. Bastet Jakoba Maria, f-ino, Amsterdam
- 5581. Koekebakker Maria Alida, f-ino, Amsterdam
- 5582. Juhn Karl, Tŭrn bei Teplitz
- 5583. Echnier Wolfgang, Praha
- 5584. Koutek Konstantin, Praha
- 5585. Guinz Otto, s-o, Praha
- 5586. Pitlik Augustin, Praha
- 5587. Silhava Ruzena, f-ino, Praha
- 5588. Kalášova Vlasta, s-ino, Praha
- 5589. Barešova Adela, f-ino, Praha
- 5590. Rihova Marie, f-ino, Praha
- 5591. Rosko'ova Ema, f-ino, Praha
- 5592. Weisskopf Morič, Praha
- 5593. Janoušek Antonin, Prahan
- 5594. Paleček Bohumil, Praha
- 5595. Mothezik Franta, Praha
- 5596. Hermann Jaroslav, Praha
- 5597. Janda Jan, Praha
- 5598. Schmid Vaclav, Praha
- 5599. Nvytilová Hedvika, f-ino, Praha
- 5600. Nvytilová Ančl, f-ino, Praha
- 5601. Hromada Rudolf, Praha
- 5602. Stejskalova Karla, f-ino, Praha
- 5603. Stejskalova Josefina, s-ino, Praha
- 5604. Ste'ska'ova Bohumila, f-ino, Praha
- 5605. Vosecky Jan, Praha
- 5606. Bauer Emmy, s-ino, Gablonz
- 5607. Burger Walter, Gablonz
- 5608. Schöler Felix, Gablonz
- 5609. Bauer Franz, Gablonz
- 5610. Wühl Rudolf, Gablonz
- 5611. Bridger Henry, Eriih
- 5612. Glücksteiner Anton, Nürnberg
- 5613. Stahl Eise f-ino, Nürnberg
- 5614. Orner Wilhelm, Nürnberg
- 5615. Link Karl, Nürnberg
- 5616. Emmert Ernst, Nürnberg
- 5617. Gottschalk Jean, Nürnberg
- 5618. Belsold Jean, Nürnberg
- 5619. Gleizhon Hans, Bärnau
- 5620. Petraschke Friedrich, Kamenz
- 5621. Hyvonnes Ester f-ino, Wernigerode
- 5622. Friman Anna, f-ino, Helsingfors
- 5623. Melchior Agnes, f-ino, Allundburg
- 5624. Nebesky Josef, Vitov/Post Schlau
- 5625. Bieber Franz, Augsburg
- 5626. Maschowitz Mizi, f-ino, Augsburg
- 5627. Bro'ky Maria, f-ino, Augsburg
- 5628. Wöike Maria, f-ino, Augsburg
- 5629. Crawley George Osborn, Torino
- 5630. Prubacki Parel, Miloslaw
- 5631. Wirth Hans, Zirndorf
- 5632. Rosa Bernhard, Zirndorf
- 5633. Eisner Reinhard, Nürnberg
- 5634. Denisch Jeka, f-ino, Zagreb\*
- 5635. Galevič Mile, St. Brod
- 5636. Peras Stefica, f-ino, Z'agreb
- 5637. Resnik Ed, Zagreb
- 5638. Takáč Šavko, Zagreb
- 5639. Takáč Magda, f-ino, Zagreb
- 5640. Neidhardt Anja, f-ino, Zagreb
- 5641. Uva'kovič Blaženka, s-ino, Zagreb
- 5642. Jozičič Antonija, f-ino, Kostjanica
- 5643. Marič-Jozičič Marija, s-ino, Kostjanica
- 5644. Rehorčič, Zagreb
- 5645. Krsnik Evica, s-ino, Zagreb
- 5646. Magič Josip, Zagreb
- 5647. Zubor Stepan, Zagreb
- 5648. Hewetson Mabel Victoria, f-ino, Blackburn
- 5649—50. anglaj-samideanoj, Blackburn
- 5651. D-ro Rothschuch Bertha, sino, Aachen
- 5652. Heesch Erich, Bremerhaven
- 5653. Schmidt Dorothea, f-ino, Bremerhaven
- 5654. Dommerich Hans, Ludwigslust
- 5655. Cenoor Irma, f-ino, P'avor
- 5656. Schweiger Maximilian, Pilsen
- 5657. Slama Anton, S'aintaugedz
- 5658. Bayer Hans, Pilsen
- 5659. Vaneč Sylva, f-ino, Pilsen
- 5660. Wascher Hans, Eggenberg
- 5661. Ga'ter Fritz, Graz
- 5662. Kabela Alois, Graz
- 5663. Hartmann Georg, Kienberg
- 5664. Altscher Bruno, Neisse
- 5665. Frye Hans, Bremen
- 5666. Frankenberger Mailde, f-ino, Mörsen
- 5667. Jones Robert P., Chorley Wood West
- 5668. Schelton Frank, Rickell, London
- 5669. Redicker Hertha, f-ino, Hamburg
- 5670. Jung Albert, Kaiserslautern
- 5671. Ling Paula, s-ino, Zürich
- 5672. Witte Lotte, f-ino, Herford
- 5673. Witte, Herford
- 5674. Witte, Herford
- 5675. Ešrefov Edhem, Ruskuco
- 5676. Morozov Nikolaj, Ruskuco
- 5677. Atanasov Ivan, Ruskuco

**Kiu ne jam aliĝis, aliĝu tuj!**



# Por Distrado.

Homoj eraras kaj estas iel submetitaj al trompoj; sed tiun mi nomas saĝa, kiu, kiam li rimarkas ke li eraris, provas reboniĝi la eraron kaj ne restas en sia obstineco; ĉar senprudenteco kaj malsaĝeco montras rigidan koron.

Sophokles.

## La gardistino de la sankta fajro en templo.

Legendo de J. L. Perec.

Homo de l' antikva mondo tiel opiniis pri fajro:

„Fajro donas varmecon, forigas malvarmon; malvarmo estas morto, varmece estas vivo — la fonto de vivo estas fajro.“

„Fajro forpelas sovaĝajn bestojn el la arbaro, fajro estas bona.“

„Fajro estas patrino de lumo. Lumo forigas la ombrojn de l' nokto... Fajro estas bonega.“

„Pura estas fajro kaj purigas ĉion — puraĵo, sanktaĵo estas la fajro...“

„Suno, luno kaj steloj, ĉio, kio lumas — estas sur la ĉielo. De tie certe la Dio prenis la fajron por la homo — pro kompatemo, ĉar kiel aspektus homo sen fajro?“

Tiel nia pra-praavo opiniis pri fajro, en sian templon li ĝin metis kaj pure kaj sankte ĝin gardis.

Por konstante gardi la fajron estis elektita virgulino; la plej sankta, la plej pura, la plej bela kaj radiantia.

La elektita virgulino gardis la fajron en la templo, kiel la pupilo de l' okulo. Ŝi donis ofere sian vivon al la plej alta kaj sankta (aŭ al la simbolo de la plej alta kaj sankta)... Ŝi transdonis sian koron kaj junulajn sentojn al la fajro, nutris ĝin kun odorfumanaj herbaĵoj, ĉirkaŭblovis per la plej pura hom-spiro kaj tenis ĝin pure kaj vivece...

Se tamen okazis, ke la fajrogardistino por momento forgesis pri la sankta fajro, deturnis sin de l' altaro, eliris el la templo — kaj la forlasita fajro estingigis —

Tiam — ve! al ŝi!  
Vivantan oni enterigis ŝin kaj plensutis la tombon...

Iam estis sieĝata greka urbo.  
Je morto aŭ vivo ekflamis la batalo inter la sieĝantoj kaj sieĝatoj.

Tamen la fina venko ne venis.  
La urbon ĉirkaŭas fortaj muregoj; ilin atakas grandegaj murrompiloj.

Herooj kuratakas la urbon; ne pli malgrandaj defendas ĝin.

Sama nombro atakas; sama defendas.  
La nombro de sagoj, kiuj flugas de la muroj malsupren, kaj la nombro de sagoj, kiuj flugas al la defendantoj supren — egalas.

Kaj — tre malofte sago maltrafas.  
La nombro de mortintoj, kiuj falas malsupre antaŭ la piedoj de l' sieĝantoj, kaj la nombro de mortigintoj, kiuj ruliĝas de la muroj urben — estas la sama.

## Diversaĵoj.

### Festo de Floroj en Locarno, Ĝardeno de Svislando.

Locarno (elp. Lokarno) bela urbeto, kuŝanta 200 metrojn super maro, estas vera ĝardeno de Svislando. Pro ĝia milda klimato ĝi fariĝis turista centro unuaranga, recipe por la restado dum printempo kaj aŭtuno — vintro.

Ci tie floras kaj maturas la tutan jaron ĉiuj sudaj floroj kaj fruktoj t. e. oranĝoj, citronoj, olivoj, palmoj, mimozoj, kamelioj kaj ĉiu alia kreskaĵo de la suda marbordo. Malgraŭ sia apudeco al la glacioj, ĝi ne konas venton nek froston estante bone ŝirmata de la apudaj montoj. El ĉiuj urboj de Svislando ĝi estas la plej ravanta. Pri ĝi oni povas prave ripeti la vortojn de l' itala poeto:

Sempre limpido è il suo cielo,  
sempre azzurra è la riviera,  
non ha caldo, non ha gelo,  
è un'eterna primavera.

Ciam hela estas la ĉielo,  
ĉiam lazura estas la lago,  
ne varmegoj ĝin ne konas,  
la printempo estas senfina.

Ne estas mirige, ke en tiuj favoraj ĉirkonstancoj la lokarnanoj povas arangi grandan florfeŝton, sukcesintan kiel vere apoteozo de la floroj.

Dum tiu festo la „Piazza Grande“ (Granda Placo) kaj la precipaj stratoj prezentis mirindan eksteraron: fenestroj kaj balkonoj estis ornamitaj je ĉarmaj desegnaĵoj kaj bukedoj; tra la helbrila verdaĵo de la laŭraj folioj kaj de l' magnolioj ekmontriĝis blankaj kaleoj, multkoloraj kamelioj, rozaj eriko, bluaj genzianoj; tuta diverskolora suda kaj montara floraro, abunde kreskanta sur la lagobordo aŭ ĝoĝiganta per vivaj koloroj la sovaĝajn angulojn de la apudaj montoj.

Meze de aplaŭdoj kaj manklakadoj okazis la procesio de la florumitaj veturiloj. Ĉirkaŭ tridek

La fajrogardistino, genufleksante ĉe la altaro kaj rigardante la sanktan fajron per timemaj okuloj, atendas vane venkosignojn de ekstere.

Ŝiaj oreloj aŭdas neniajn venkokriojn, nenian fanfarsonon; ne aŭdiĝas paŝoj de venkintoj al la templo.

Tremas la koro de la virgulino.  
Ŝia gepatra urbo ankoraŭ estas en danĝero; kaj kun la urbo la sankta templo, kaj la altaro kun la sankta fajro...

Kaj grandega deziro ĉirkaŭkaptis ŝin:  
Ŝi nepre devas eliri el la templo kaj vidi; nur unu sekundo observi la batalon...

Ŝi ne povas superregi la deziron kaj eliris el la templo.

Tuj al ŝiaj piedoj de la muregoj malsuprenruliĝis malviva korpo. Ekmankis heroo en la vico de la defendantoj, pligrandiĝis la danĝero...

Subite ŝi kaptas la sagjetilon el la mano de l' mortigito.

Rapide kiel fulmo ŝi saltas sur la murojn; ek-tiras per tremanta mano la sagokordon, celas, kaj trafas — la plej grandan heroon inter la sieĝantoj.

Ektremis la pesilo de feliĉo; plipezis la feliĉo de ŝia gepatra urbo.

Forpuŝitaj kaj forpelitaj estas la sieĝantoj, liberigita estas la urbo, defendita la sankta templo.

Kun ĝojekrioj kaj laŭdkantoj, kun disvolvigitaj standardoj, kun bruantaj trumpetoj kaj fanfarmuziko rapidas la venkintoj al la templo — ilian Dion, la dion de la urbo dankpreĝi kaj —

Ili restas kvazaŭ ŝtonigitaj...  
Mallumo regas en la templo!  
En la momento de l' venko estingigis la fajro...

Oni elkondukas la fajrogardistino, kiu donis la venkon, el la templo kun kantado kaj muziksonado sub sanktaj standardoj.

Oni kondukas ŝin vesitajn kaj vualitajn per oraj kaj arĝentaj vestoj; per floroj estas ornamita la vojo de la defendita urbo al la libera kampo, al la tombo...

Ĉe la tombo oni ŝin haltigas kaj sur la kapon de la venkinto oni metas laŭrokronon...

Genufalas antaŭ ŝi la pastraro kaj la urbestroj, ili ĉirkaŭas ŝin genufleksante kaj kisas la randojn de ŝiaj mantelo kaj robo.

Finsonas la fanfarmuziko kaj mutiĝas...  
Dum la plej granda silento oni enterigas ŝin, kaj oni plensutis la profundan tombon...

Tiel al mi rakontis du profundaj, nigraj okuloj el pala vizaĝo, kaj mi tion al vi rerakontis.

El juda lingvo tradukis  
I. Jurys.

## La Filatelistoj.

De Arkardij Averĉenko.

Mia malsanema memamo kaŭzas al mi eternajn malagrablaĵojn...

Antaŭ nelonge min vizitis amiko kaj demandis solene:

„Vi estas literaturisto?“  
„Mi opinias, ke jes!“  
„Bone! Post unu horo vi iros kun mi al solena kunsido de la loka rondeto de filatelistoj.“

„De kia rondeto?“

estis la ĉaroj riĉe ornamitaj, reprezentantaj bildojn el la lokarna natura vivo. Tre ĉarma estis la „Barca del Lago Maggiore“ (ŝipeto de l' Lago Maggiore) veturanta edziĝintan paron al edziĝvojaĝo; tiu ĉaro estis tre pacience elaborita kun blankaj kaj rozaj kamelioj sur hela fundo de laŭraj folioj; alia tre ĉarma veturilo reprezentis verdan moneton kun laŭbo el floranta persikujo; alia idilia laŭbo estis ornamita ne nur je elektitaj floroj sed ankaŭ je ĉarmaj belulinaj; sekvis veturilo arte ornamita, kiu reprezentis ciklonion el blanka spiro, vaporumanta floro balancata de l' vento por la senpezeco de siaj plumoj.

Estis admirindaj kioskoj el glicinoj, kiuj ridetis tra palmoj, grandegaj cigno el blankaj kamelioj, kiujn gvidis princoj kaj reĝinetoj; naturgrandaj pelikanoj el blankaj kaj diverskoloraj floroj; aŭtomobiloj kies sola ornamo estis oranĝoj el la lokarnaj ĝardenoj; korboj el ĝirofloroj; japanaj veturiloj kun tegmentoj el flamantaj kamelioj; bicikloj; grupoj da kamparaninoj en malnovaj kostumoj, kies dorskorboj estis plenaj je bukedetoj; resume, la longa sekvantaro estis plena je vivo kaj ĉarme ĝoĝiganta per la plej diversaj koloroj, rememoriganta la mondon de l' feinoj.

El ĉiuj veturiloj kaj el ĉiuj balkonoj aŭ fenestroj oni amase elŝetis florojn; la tuta popolo partoprenis entuziasme je la florbatalado, sekve, la granda placo ŝajnis laŭliere kovrita de multkolora tapiŝo... Tio estis por ĉiuj partoprenantoj neforgesebla tago de aria ĝuado.

Tiu florfeŝto okazis unufoje en Locarno la unuan dimanĉon post pasko, vizitis ĝin almenaŭ 10000 fremduloj alvenintaj el ĉiu angulo de Svislando, eĉ multaj el eksterlando. La lokarnanoj intencas organizi tiun feston ĉiujare; ni bondeziras al ili kreskantan sukceson, esperante, ke niaj

loknaj samideanoj profitos de la venontaj okazoj por ornamu veturilon kun Esperanta simbolo. Tio estos por ili sendube facila tasko kaj certe sukcesos kiel taŭga propagando por nia movado.

C. G.

La Estonia Parlamento konfirmis krediton je 3 milionoj da est. markoj (ĉ. 10000 dolaroj) por eldono de Estonia Enciklopedio. La redaktado de la verko estas komisiita al interministra komisiono, konsistanta el fakuloj, kiu ellaboris la programon kaj gvidas la laboron de l' specialistoj, kiuj kompilas apartajn ĉapitrojn kaj artikolojn. La enciklopedio aperos fine de nuna jaro kaj konsistos el du volumoj, ampleksantaj pli ol 1.100 paĝojn kun ilustraĵoj. Laŭ enhavo ĝi similos konatan informilon „Schweden“ (Svedujo), eldonita germanlingve, kaj ĉiuflanke priskribos la landon kaj ĝian popolon. Apartaj ĉapitroj temos pri geografio, arkeologio, historio, kulturo, etnografio kaj mitologio, lingvo, literaturo, muziko, politika kaj ekonomia stato ktp.; entute la verko estas dividita je 98 artikoloj. Por diskonigi Estonion en eksterlando estas preparotaj pluaj eldonoj (en angla kaj franca lingvoj), kiuj aperos venontan jaron.

Estonia Esperanto Servo.

Hungara gazeto en Ostende.

La suban ĉarman okazintajn Stefano Szomaházy, la konata hungara verkisto rakontis en la kafejo „Newyork“ en Budapeŝto — pri la redaktoro Ludoviko Brajjer, kiu antaŭ la milito aperigis la gazeton provincan „Toroutál.“

Szomaházy renkontiĝis unue en la bela tempo de la pacaj jaroj kun sinjoro Brajjer en Ostende, el kies poŝto ekvidiĝis la plej nova numero de „Toroutál.“ Ili promenadis sur la marbordo, kie

„De filatelistoj! Ĉu estas eble, ke vi ne scias, kio estas tio ĉi?“

Homo kun malpli malsanema memamo respondus simple kaj malkaŝe:

„La diablo sciu ĝin...!“  
Sed mi ŝajnis ofenditan vizaĝon kaj malafable demandis:

„Kio estas tio ĉi... ekzameno? Ĉu efektive, vi opinias min tiel malklera, ke mi ne scias, kio estas — filharmonistoj?“

„Filatelistoj!, sed ne filharmonistoj.“  
„Laŭ la loko. Sur la Biskajja bordo ĉie oni nomas ilin filharmonistoj. Loka kutimo.“

„Bone, ni do iras?“  
„Sed, kion mi farus tie?“  
„Aŭskultu. Vi devas tie fari salutparolon en la nomo de la rusa literaturo.“

„Kio, pro diablo? Mi ja ne estas paroladisto!“  
„Tio estas negrava. Vi parolos ruse kaj tie neniu la rusan lingvon komprenas. Via parolado estos nur simpla signo de ĝentileco. Mi jam promesis, ke vi parolados...“

„Sed kia diablo iris vin ĉe la lango por tion promesi? Mi ne iros!“

Sed, kial do vi ne iros?! Via salutparolado eĉ ne ius la tagordon. Vi diros kelkajn ĝeneralajn vortojn pri la esenco de l' filatelio, pri ĝiaj limoj, pri ĝia estonteco — jen estas ĉio. Do, vestu vin, mi petas!“

Mi pli ŝatus morti ol konfesi, ke »filatelisto« estas por mi enigma sanskripta vorto... Kaj en nia malbenita tempo nenie estas havebla enciklopedia vortaro...

„Atendu, mi diris nervece. „Mi devas telefonparoli — unu aferon! Mi tuj venos.“

Mi elsaltis el la ĉambro, ekkursis malsupren.

„Halo! 137—12. Ĉu tie estas vi, Pjotr Semjonoviĉ? Bonan tagon! Kiel vi fartas? Kaj mi, vi scias, anĝis en rondeto de filatelistoj.“

„Bone, mi gratulas!“  
„Ĉu vere? Dankon!.. Vi aprobas tion?“  
„Kompreneble! Eĉ mi mem iam okupiĝis pri tio.“

„Kaj...?“  
„Nenio! Poste mi ĉesis...“  
„Ĉu tio influis vian sanon?“  
„Kial mian sanon?“

„En tiu senco, ke superflua laboroj iel influas...“

„Laboroj? Kiaj do laboroj? Tio estas pli ĝuste plezuro.“ (Jen netaŭgulo! Ĉu estas eble paroli pli malklara?)

„Sed, Pjotr Semjonoviĉ, eble vi povus doni al mi kelkajn konsilojn, utilajn por filatelisto?“

„Kiajn konsilojn?... Aĉetu por vi albumon kaj roŝtu<sup>1)</sup> ĝin!“

„Vi diras... roŝti?“  
„Nu, jes! Brogu,<sup>2)</sup> se vi volas!“

Mia kapo kvazaŭ rondiris. Kia mistera kaj enigma profesio (aŭ plezuro?), kies celo estas roŝti albumojn?! Kaj kial brogi?

Mi ekspiris, telefone finis mian parolon. Mi postulis alian numeron.

„Vasilij Jevstignjeviĉ? Mi vin salutas! Aŭskultu... Mi volis vin demandi: Kion vi opinias pri la... filatelistoj?“

<sup>1)</sup> ruse: ĵarĵije signifas iam: laboregu, faru spite ĉion, nenio vin timigu.  
<sup>2)</sup> ruse: ŝparĵije signifas: superversiĝi ion per bolanta akvo, sed eĉ tie nur komika respondo pro la nekomprene de la demandinto.

loknaj samideanoj profitos de la venontaj okazoj por ornamu veturilon kun Esperanta simbolo. Tio estos por ili sendube facila tasko kaj certe sukcesos kiel taŭga propagando por nia movado.

C. G.

Estonia Enciklopedio.

La Estonia Parlamento konfirmis krediton je 3 milionoj da est. markoj (ĉ. 10000 dolaroj) por eldono de Estonia Enciklopedio. La redaktado de la verko estas komisiita al interministra komisiono, konsistanta el fakuloj, kiu ellaboris la programon kaj gvidas la laboron de l' specialistoj, kiuj kompilas apartajn ĉapitrojn kaj artikolojn. La enciklopedio aperos fine de nuna jaro kaj konsistos el du volumoj, ampleksantaj pli ol 1.100 paĝojn kun ilustraĵoj. Laŭ enhavo ĝi similos konatan informilon „Schweden“ (Svedujo), eldonita germanlingve, kaj ĉiuflanke priskribos la landon kaj ĝian popolon. Apartaj ĉapitroj temos pri geografio, arkeologio, historio, kulturo, etnografio kaj mitologio, lingvo, literaturo, muziko, politika kaj ekonomia stato ktp.; entute la verko estas dividita je 98 artikoloj. Por diskonigi Estonion en eksterlando estas preparotaj pluaj eldonoj (en angla kaj franca lingvoj), kiuj aperos venontan jaron.

Estonia Esperanto Servo.

Hungara gazeto en Ostende.

La suban ĉarman okazintajn Stefano Szomaházy, la konata hungara verkisto rakontis en la kafejo „Newyork“ en Budapeŝto — pri la redaktoro Ludoviko Brajjer, kiu antaŭ la milito aperigis la gazeton provincan „Toroutál.“

Szomaházy renkontiĝis unue en la bela tempo de la pacaj jaroj kun sinjoro Brajjer en Ostende, el kies poŝto ekvidiĝis la plej nova numero de „Toroutál.“ Ili promenadis sur la marbordo, kie



„Kiel? Mi opinias ilin frenezaj. Speciala formo de frankvila frenezo!“  
 „Kion vi diras?! Sed... tio ne estas danĝera?“  
 „Kiel diri al vi — ekzemple mia fileto tute frenezigiĝis. Li dormas kun la albumo.“  
 „Kia stranga knabo. Kaj vi — kion vi pensas pri tio?“  
 „Mi? Mi deziras verĝati lin.“  
 „Sed, oni diras, ke ekzistas eĉ tia „fondeto“?... de filatelistoj!“  
 „Per bastono oni devus displi ilin!“  
 „Aŭskultu... sed, se eble... ĉu sciigi la policon?“  
 „Pro kio la policon? Nu, adiaŭ — oni vokas min.“

Tio estis ĉio, kion mi povis eksci pri la filatelistoj.  
 Kiam mi revenis, mia amiko jam tenis en la mano miajn ĉapelon, palton kaj bastonon.  
 „Ni veturu, veturu, pli rapide!... Alie ni malfruigos. Estus malgentile i in longe atendigi!“  
 „Aŭskultu, mia kara... Eble, vi pli bone parolus, kaj mi aŭskultas. Nu?“  
 „Kial mi? Kiu el ni estas verkisto? Ĉu mi aŭ vi? Vi! Do, vi parolados!“  
 „Sed mi nur malmulton scias pri tiu... afero.“  
 Do, paroladu, nur ion ĝeneralan. Ruse ili komprenas eĉ ne vorteton. Vi nur plenumos formalan ĝentilajn — jen ĉio.“  
 Bone faras tiuj, kiujn oni veturigas al la ekzekuto. Oni alveturigas ilin, dehakas la kapon — kaj ĉio estas finita. Eĉ reveni ili ne devas. Sed mi veturos al la ekzekuto — kaj post tio mi devos ankoraŭ pasigi longan malhonoran vivon...“

Kiam ni eniris, eble kvindek homoj salutis nin per tondra aplaŭdado. Mi mallerte riverencis kaj eksidis.  
 „Ne sidigu!“ ekpuŝis min mia amiko.  
 „Ni alvenis ĝustatempe. Oni atendas vian paroladon.“  
 „Sed, eble... tamen ni... malfruigiĝis...?“  
 „Tute ne! Jen vidu — la prezidanto peias vin ekparoli. Do, parolu!“  
 Mi ekstaris, pense faris la krucoŝignon kaj pense saltis de alta bordo en nekoneatan malvarman akvon...“

„Estimataj sinjoroj kaj estimataj sinjorinoj! En la nomo de la rusa literaturo, tiu literaturo, kiu donis al ni Puŝkin-on, Gogol-on kaj Ĉehov-on — mi salutis vin... (Malakraj rigardoj. Frankvila ravo. Voĉoj: brave!) Ne mia afero estas kaj ne mia tasko paroladi pri filatelistoj entute, kvankam mi ilin profunde estimas, kiel portantojn de alta, belega, eterna... (Komuna »brave«, brua aprobo de mia amiko...) Kio estas filatelisto ĝenerale kaj speciale? Ĝi estas okupo ne pli malbona ol iu alia, kaj ĝi eĉ pliŝatas filateliston ol vendiston de ŝtelataj aŭ spekulistoj je kokaino. *Ars longa vita brevis*, kiel diris Newton (brua ravo de la ĉeestantoj. Mi videble kuragiĝas kaj gajigas. Sufoke-mallaŭta murmuro de de mia amiko: »Kion li jen fiparolas?!« Nenio tiel beligas la homon, kiel la juneco, sed ankaŭ la frankvila maljuneco havas sanajn radikojn! Do ni vivu dum ni vivas!!!“  
 Tiujn ĉi vortojn mi elparolis tiel patose kaj tiel entuziasme, ke la kunteveno ektremis pro aplaŭdado... Sur mia dorso mi sentis furiozan

trabrugigantan rigardon de mia amiko, kaj tial mi penis ne rigardi al lia flanko.

„Mi daŭrigas! Oni sciigas al mi, ke la filatelistoj rostas albumojn sur malgranda fajro kaj poste brogas ilin per bolanta akvo... Ĉu ili — ne la filatelistoj, sed la albumoj — post tio ĉi taŭgas kiel manĝaĵo — jen estas demando de persona gusto. La policon ne koncernas ĉi tio, — nu, estu tiel! Kaj, entute, la filatelisto estas aparta speco de frankvila frenezo!“ (Mi estas en granda entuziasmo. Komunaj elkroj »brave!« — la voĉo de mia amiko ne estas aŭdata — mi sentas, ke li svenas...)“

Kaj tiel, dum tagmeza varmeĝo en la valo Dagestana ni estas sur la bordo de Njevâ! Sub la blua ĉielo de Georgio en la belega Andaluzio beluĝino floris... Lavu la infanojn nur per sapo »Jupiter«, ne trinku neboligantan akvon, kaj la tero estu por vi lanugo!!

Kaj se la okuloj de nia kontraŭdanto, sinjoro la prezidanto, ne memorigus min pri glaciita oleo, mi eĉ kisus lian de ravo dependantajn lipetojn! Komprenable: rostu, brogu albumojn, sed min vi lasu frankvila, ĉar per bajoneto mi scias manipuli, ĉar mi naskiĝis proksime de Kaŭkazo!!! Mi finis!!! (Bruega ravo de la kunvenintaro; foriozaj aplaŭdoj.) Ekvidinte la irapuŝigantan al mi, kun tre evidentaj intencoj, amikon, mi kaptis la palton, ĉapelon, kaj evitante la ovaciojn, evitante la interparolon kun la amiko, mi rapidegis al la elirejo...“

Li min atingis nur ĉe la dua kvartalo.  
 „Aŭskultu! Vi... vi... estas aŭ frenezulo aŭ idioto?!“

„Nu, kial tiel malafable,“ ekridis mi. „Pli ĝuste diru al mi almenaŭ nun: — Kion faras la filatelistoj?!“

„Ĉu vi ne sciis?! O, stultulo!! — Ili kolektas markojn!“

„Sed kial, pro Dio? Nuntempe la markoj ja tiel »faŭsas«, ke por dek dolaroj donas...“

„Ferkapulo! Ili kolektas poŝtajn markojn!“ Jen fine mi informiĝis!

Cetera mi ne pentas; eĉ se mi estus sciinta tion pli frue. — mi farus akurate la saman paroladon, ne ŝanĝente eĉ unu vorteton!

Tradukis el rusa lingvo  
 Leo Kontarĵi Cauŝani-Noi, Besarabio.

**Bibliografio.**

Nur duoble ricevita libro n. prospektilo k. s. ni mencias aŭ recenzas. Kiam libro aperis b'indite, ni peias minimume unu blindaŭt ekzempleron

**Esp. Libro, Prospektaj k. s.**

**Abismoj.**

Romano originale verkita de Jean Forge. 150 pĝ. broŝur. Prezo 3 ŝv. fk. por maŭbonv. 3 gmk. X ŝlosinombro. Eldonejo Ferd. Hirt & Sohn en Leipzig.

En sia antaŭparolo diris la aŭtoro:

„Estante nacilingva verkisto, mi sentas la tenton skribi originalan verkon en Esperanto. Kaj rimarkante la kreskantan ŝaton de la nacilingva leganto pro la moderna romano, mi supozas, ke ankaŭ inter la Esperantistoj — ja homoj plej progresemaj — troviĝos similaj ŝatantoj pro tiapeca romano.“

Mi deziras kontentigi per ĉi tiu verko la guston de l' moderna leganto: kreskante ion, ĉio similas kaj samvaloras la hodiaŭn nacilingvan romanon laŭ sifilo kaj enhavo, verkanie ion nuntempan en la Esperanto de la jaro 1887 kaj fine restante internacie komprenebla kaj sendependa de la nacilingva idiomo.“

La enhavo de la romano estas en kelkaj linioj jena: Juna preŝtisto Mateo Ardo revenas el eksterlando al sia fianĉino Zonio Biringo. En vagonaro li ekdormas, preterveturas la hejman stacion kaj restas unu nokton en la domo de gastigema bienisto Borki kaj ties ĉarma filino

**Malespero.**

Ĉu do inde kredi,  
 Dolĉajn revojn sendi,  
 Por ideoj pledi,  
 Je feliĉ' atendi?  
 Songi pri kompreno  
 Vane sopirata,  
 Revi pri alveno  
 De l' homaro frata?  
 Ja ne en ĉielo  
 Estas la feliĉo,  
 En malpura tero  
 Ĝermas gloro, riĉo.  
 Kiu ne en nuboj  
 Serĉas la nemion,  
 Sed el teraj duboj  
 Ne sentante ion  
 Kun anim' egala  
 Guas ĉiun horon,  
 Nek mizero pala  
 Tuŝas lian koron,  
 Nek doloron kaŭzas  
 Al li flu' de sango,  
 Malpuraj ne naŭzas  
 Lin, nek trap' je vango,  
 Kiu vir' ne baras,  
 Ĝin por ĝu' li jetas,  
 Kiu tuj ekstaras  
 Lerte, se ŝaletas,

Kun mien' admona  
 Ludas rolon pian,  
 Sed por mono bona  
 Vendas kredon sian!  
 Kun perfid' senfunda  
 Agas, logas, trompas,  
 Kaj en riĉ' abunda  
 Fanfarone pompas,  
 Kies vivprincipo  
 Kliras sin laŭ tago,  
 Kiel sur la ŝipo  
 Laŭ la vent' la flago:  
 Jen la feliĉulo!  
 La homargvidanto!  
 En la mondobruo  
 Brilas lia vanto,  
 Lin la mond' trompata  
 Admirante fidas...  
 — Moko senkompata  
 La stultulon ridas,  
 Kies revo: veno  
 De l' homaro frata,  
 Kaj song' la kom-  
 Vane sopirata, [prezo  
 Kiu povas kredi,  
 Dolĉajn revojn sendi,  
 Por ideoj pledi,  
 Je feliĉ' atendi...“

Paŭlo Balkanyi.

**La nelegebla skribaĵo.**

Instruisto de la franca reĝo Ludoviko XIV-a en lia juneco, estis la ministro Fleury, kaj lia militista edukanto estis koncerna Villeroy. Foje Villeroy skribis lerteron al la ministro pentis la edukadon de la reĝa lernanto. Vane la ministro koncerna, neniel li povis legi la menskribon de la lertero; li ne sukcesis decifri la hieroglifojn de la generalo. Inter la proksimuloj troviĝis ankaŭ neniu kapabla tion fari. Ekdecidinte la ministro iris al la generalo kaj redonis al li la lerteron per jenaj vortoj: „Via manuskripto, kara generalo, foje kaŭzos al ni tuteŝtran kompromitiĝon, ĉar rajte oni diras: La franca reĝo havis edukanton, kiu ne povis skribi, kaj instruiston, kiu ne povis legi.“

Halino, kiu ekamas lin. Tamen jam frue en la alia mateno li forlasas la domon. Junu najbara bienisto Ernesto Musko, kiu estas bankrotita pro malekonomia vivado, vizitas la bienon de Borki kun intenco gajni Halinon kaj kun ŝi bonan doton. Li sukcesas tiom pli facile, ĉar Halino kolekas al Mateo pro lia rapida foiro. Sed kiam post kelkaj tagoj Mateo revenas, Halino lasas Erneston. Ĉi tiu vidante ke li perdis la ludon, ebrigas sin, en ebrio ekbruligas sian bienon kaj mortas en la flamoj. Mateo fine tamen restas fidela al sia fianĉino, spite la tentojn de la bela Halino, forkuras el la domo de Borki kaj revenas al sia Zonio.

La enhavo do estas eksterordinara. Vere originala tamen estas la ideo „enkadrigi“ la romanon per epizodo el la vivo de maljuna verkisto. Tiu ĉi verkisto, iam fama sed nun mizera, ĉar lia cerbo estas „elsuĉita“, venas en kabaredon kaj konatiĝas tie kun hinda fakiro. Li rakontas al la fakiro sian mizeron, kaj ĉi tiu montras al li per mistera ilusigiilo la „abismojn“ de homaj animoj, por ke li poste skribu pri ili. En songosimila stato la verkisto kvazaŭ transformiĝas en la agantajn personojn de la romano, kvazaŭ mem travivas ilian sorton kaj rakontas iliajn (nun jam siajn proprajn) travivaĵojn kaj pensojn.

La stato de la romano, kvankam kelkfoje iom stranga, estas ĉie flua kaj facile komprenebla, ĉar la aŭtoro skribas nur en mallongaj frazoj. La Esperanto tamen ne estas tute „La Esperanto de la jaro 1887“, kiel la aŭtoro skribas en la antaŭparolo, ĉar mi trovis kelkajn vortojn, estigintajn en pli posta tempo, ekz. ŝvablingle, ĝapi, ŝvebi; sed tio ne gravas. Naciismo ŝajnas al mi esti: pli freŝa (anst. iom freŝa aŭ freŝeta), ĝi penetras al mi en la okulojn (anst. ĝi penetras en miajn okulojn). Gramatika eraro estas: imagi al si. Post: permesis, ke... mi preferas uzi la imperativon anst. la kondiĉan formon; post „trans“ mi rekomendas uzi la akuzativon por montri direkton. Ne plaĉas al mi, ke la aŭtoro uzas Esp. nomajn apud nacilingvaj, ekz. Karlovo, Kastelujo. Jen la malmultaj kritikindaĵoj!

Laŭdinda estas la preso de la libro. Da preseraroj mi trovis eĉ ne unu, krom kelkaj defalintaj supserigoj.

Resume mi povas diri, ke la unua verko de Jean Forge' al mi persone bone plaĉas kaj mi rekomendas ĝin al ĉiuj samideanoj ŝatanta modernan (tamen ne tro modernan) verkon.

La nomo de la aŭtoro sendube estas pseŭdonimo; sed li ne estas bezoninta timi aperigi sian verkon sub sia vera nomo, tiom malpli, ĉar kiel nacilingva verkisto — li iam aperigi ŝatarejn modernajn romanojn, kiel oni devas supozi laŭ la antaŭparolo.

Teo Jung.

SAMOLICZEK pomocniczego języka miedzynarodowego Esperanto w dziesięciu lekcjach. I ernolbro por poloi, de L. Kronenberg. Triá eldono. Presejo por Komercio kaj Industrio en Bydgoszcz.

LA CONFERENZA intern. per l' adozione della lingua Esperanto nelle relazioni commerciali e turistiche internazionali, Venezia, 1.-5. aprilo 1923. — De Dr. Prof. Vito de Menedetto. Prezo 4 lir. Itala Esp. Presejo Bortone & Miccoli en Lecce.

FOIRO REICHENBERG sendis sian belan afŝon en blua, verda kaj ora koloroj pri Kvara Int. Foiro de Reichenberg, Ĉeĥoslovakio, 11.—19. 8. 1923.

FOIRO LEIPZIG. 26.8.—1.9. 1923. — 6 paĝa reklamilo, redaktita en Esperanto, moderne presita, dukolora, kun ilustraĵoj. Kun 2-paĝa cirkulero al la Esperantistoj.

NÜRNBERGER ESPERANTO-TRICHTER. Leitfaden für Schnell- und Massenkunden. 11.—50. milo. Eldonejo Ellersiek & Borel, Berlin SW.61. Wilmstr. 8.

ADRESARO de Esp. kombistoj el diversaj landoj. Eldonis V. Jaroš, perukisto en Místek, Ĉeĥos.

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, 17 Hart Street, London W. C. 1, sendis al ni sekv. eldonaĵojn, kiujn ni nur mencias, ĉar ni ricevis nur por unu ekz.: 1. Alegorioj el la Naturo. De M. Gatty. El angla lingvo trad. G. Gordon. Dua pligrandigita eldono. 66 pĝ. kart. Prezo 1 ŝil. — 2. Le Espero. Himno Esp. Muziko de F. de Ménéil. Prezo 6 pc. — 3. Esperanto. Humora kanto de H. Hill. Prezo 3 pc. — 4. La Vera Frataro. Vortoj kaj muziko de H. Hill. Prezo 3 pc. — 5. Himno de Danko. Vortoj kaj muziko de H. Hill. Prezo 3 pc.

ESPERANTO ALS INTERNATIONALE HILFSSPRACHE. Bericht des Generalsekretariats des Völkerbundes, angenommen von der 3. Vollversammlung des Völkerbundes. Deutsche Uebersetzung. 48 pĝ. kart. Prezo 0.40 gmk. X ŝlosiln, bonvalutuloj 0.40 ŝv. fr. Eldonejo Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig, Esp. fako.

Goje ni saŭtas la aperon de germanlingva traduko de la raporto de L. d. N. pri Esperanto, kiu ĝis nun ekzistis nur en lingvoj franca kaj angla, la du oficialaj lingvoj de la Ligo. La traduko estas farita laŭ la franca originalo kaj komparita kun la angla teksto. Arango kaj prezo estas bonaj, kiel ĉe ĉiuj eldonaĵoj de la firma Hirt. La prezo estas tre modera. Tial oni rajtas esperi, ke ĉiu serioza samideano en Germanlingvujto mendos kaj uzos tiun ĉi eksterordinare gravan verkon tiel plej konvinkan propagandilon.

LA ALMOZULINO DE LA „PONT DES ARTS“. Novelo de Wilhelm Hauff. — El la germana lingvo tradukis K. Brüggemann — Universala Biblioteko no. 4. 1923. Esperanto-Verlag Friedrich Ader, Dresden A 27. — 144 pĝ. 10 1/2; 16 cm. Prezo: 1,10 Mk. X ŝlosinombro, 1,10 Fr. sv. por bonvalutaj landoj.

Jam antaŭ kelkaj jaroj aperis traduko de Hauff'a novelo (La kantistino, trad. Dr. Wüster). Ni nun posedas duan novelon de la sama germana poeto en bonega traduko farita de la fama konata stilisto Brüggemann. Ĉiuj noveloj de Hauff, verkitaĵoj en la dua jardeko de l' psinta jarcento, estas spegulo de l' vivo tiutempa, de epoko, en kiu la literaturo posedis eminentajn korifeojn. Hauff meritas la titolon de interesa rakontisto, kiu ornamiis malofte trovebla talento, viva fantazio kaj ĝoja humoro. Precipe la germana junularo ŝatas la tro frue mortintajn poetojn, kies fabeloj ravas ĉiun leganton. Ni tre deziras ke nial eksterlandaj samideanoj ne malatentu ĉi tiun ĉarmatan, allogan rakonton, kiu ĉi germana literaturamanto posedas en sia biblioteko.

G. Ajul.

**Esp. Gazetoj.**

Esperanto, junio. I.a. raporto pri diversaj neĉaj Esp. kongresoj. — Aldonoj: „Bulteno de Int. Lab. Of.“ kaj „Informilo“.

Sennacieca Revuo, junio.

La Interligilo de l' P.T.T., majo.

La Franc Postale Esperantiste, aprilo.

Esperantista (malnura), majo-junio.

Bulgara Esperantisto, majo.

Holanda Esperantisto, 23.6.

Belga Esperantisto, marto-aprilo. Kun raporto pri Venezia — en franca kaj flandra lingvoj.

Svenska Arbetaresperantisten, junio.

Esperanto-Praktiko, junio.

Hungara Esperantisto, junio.

Esperanta Finnlando, marto-majo.

La Progreso, majo-junio. Kun aldonoj al Vortaro de Kab. Marto, junio.

**Alte kaj malalte.**

De Jan Lemański.

Sin observas du homoj:  
 Staras alte l' unua,  
 Sur pinto de l' monto,  
 En kaveto la dua.  
 „Ho! kiel li eta.“  
 L' unua diris.  
 „Jen estas pigmeo.“  
 La dua miris.  
 „Mi grimpos“, li pensas,  
 „Al tiu etulo.“  
 „Al tiu etulo“, la dua,  
 Al tiu hom-pulo.“  
 Il' iras kontraŭten  
 De punktoj la malaj,  
 Rigardas proksime:

El pola lingvo esperantigis A. g.